

# Unu komuna Kredo

Publikaĵo de la Bahaa Mondcentro

One Common Faith  
verkita kaj eldonita nome de La Universala Domo de Justeco  
Bahaa Mondcentro, Haifa 2005

Esperantlingva traduko el la angla originalo  
Bahaa Esperanto-Ligo  
Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio  
T +49-(0)6192-9929-16; F +49-(0)6192-9929-99  
bel@bahai.de – www.bel.bahai.de

© Bahaa Esperanto-Ligo  
Hofheim-Langenhain, 2015

**M**ultkiale oni povas fidi ke la historia periodo nune malfermiĝanta estos multe pli akceptema por klopodoj disvastigi la mesaĝon de Bahá'u'lláh ol estis la jarcento ĵus finiĝinta. Ĉiuj signoj indikas ke profunda ŝanĝiĝo de la homa konscio survojas.

<sup>2</sup> Komence de la dudeka jarcento materiisma interpretado de la mondo estis tiom komplete disvastiĝinta ke ĝi fariĝis la dominanta monda kredo pri la direktiĝo de la socio. La elformiĝado de tiu ĉi ideologio tiel perforte tordis la civilizadon de la homa naturo ke ĝi elpuŝiĝis el la orbito kiun ĝi estis sekvinta dum jarmiloj. Por multaj okcidentuloj la Dia aŭtoritato, kiu ĉiam estis la fokuso de orientiĝo, ŝajnis – kiel ajn malsamis la interpretadoj – simple dissolviĝinta kaj malaperinta. Grandskale nun estis ankoraŭ la individuo libera teni kun la mondo transcendentanta la materian ekzistadon iun ajn rilaton pri kiu ĝi kredis ke konektus la vivon al ĝi. Sed la socio kiel tuto kun kreskanta konfido antaŭenpaŝis separante sin de dependo je tia koncepto pri la universo – koncepto kiun de nun oni konsideris en la plej bona kazo fikcio kaj aliektreme opio. La homaro estis preninta sian sorton en la propran manon. Per racia eksperimentado kaj diskurso ĝi estis solvinta – tiel almenaŭ oni kredigis al la popolamasoj – ĉiujn fundamentajn problemojn de la socia disvolviĝado.

<sup>3</sup> Tiun ĉi sintenon fortikigis la supozo ke la valoroj, idealoj kaj disciplinoj kultivitaj tra la jarcentoj estus nun firme fiksitaj kaj daŭraj ecoj de la homa naturo. Necesus nur ankoraŭ ilin plu rafini per edukado kaj plifortigi per leĝdonado. La morala legacio de la pasinteco estis simple tio: la netuŝebla heredaĵo de la homaro – bezonanta neniam pliajn religiajn intervenojn. Estis koncedite ke sendisciplinaj individuoj, grupoj aŭ eĉ nacioj daŭre minacus la stabilecon de la socia ordo kaj necesigus korektadon. La universala civilizacio, al kies elformiĝo la fortoj de la historio estis kondukintaj la homaron, disvolviĝadus senresiste, inspirita de sekularaj konceptoj. Kiel la feliĉo de la homoj estis konsiderata la natura rezulto de pli bona sano, pli bona nutraĵo, pli bona edukado, pli bonaj vivkondiĉoj – kaj la realiĝado de tiuj ĉi evidente dezirindaj celoj ŝajnis nun atingebla por socio tute fokusita je ilia efektivigado.

<sup>4</sup> Tra tiu mondoparto tamen kie vivas la plejmulto de la monda loĝantaro facilanimaj anoncoj ke „Dio mortis“ preterpasis plejparte nerimarkite. La sperto de la homoj en Afriko, Azio, Latinameriko kaj Pacifikio delonge estis konfirminta ilian konvinkon ke ne nur estas la homa naturo profunde influata per spiritaj fortoj sed ke ĝia identeco mem estas spirita. Sekve religio daŭris funkcii, kiel ĉiam tiel estis, kiel la fina aŭtoritato de la vivo. Kaj kvankam tiun ĉi konvinkon ne rekte trafis la ideologia revolucio okazanta en la Okcidento, la lasta tamen ĝin efike marĝenigis almenaŭ en la kampo de la interrilatoj inter popoloj kaj nacioj. Dogma materiismo, penetrinta kaj kaptinta ĉiujn signifajn centrojn de potenco kaj scio tutmonde, certigis al si ke restis al neniu rivalaj voĉoj la eblo defii strebojn de tutmonda ekonomia ekspluatado. Al la kultura damaĝo jam kaŭzita de du jarcentoj da koloniado tiel aldoniĝis agoniiga separo inter la interna kaj la ekstera vivsperto de la trafitaj amasoj – kondiĉo kiu invadis praktike ĉiajn aspektojn de la homa ekzistado. Senigitaj de la kapablo iel vere influi la elformiĝadon de sia estonteco aŭ eĉ nur konservi la moralan bonstaton de siaj infanoj, tiuj ĉi popolamasoj estis ĵetitaj en krizon malsaman sed multrilate eĉ pli detruan ol tiu pli kaj pli afliktanta Eŭropon kaj Nordamerikon. Kvankam kredado tenis sian centran pozicion en la konscio, ĝi tamen montriĝis senkapabla plu efiki la iron de la eventoj.

<sup>5</sup> Kiam la dudeka jarcento proksimiĝis al sia fino, ŝajnis tial nenio malpli probabla ol subita releviĝo de la religio kiel temo kun decida kaj tutmonda signifo. Tamen, tio estas ĝuste kio nun okazas en la formo de ondo da timo kaj malkontento – ankaŭ se plejparte nur svagas la konscio pri la spirita vakuo ĝin kaŭzinta. Pratempej sektaj konfliktoj, evidente surdaj je pacienca diplomatia arto, releviĝas pli virulente ol iam antaŭe. Temoj el la sanktaj skriboj, nerealaj fenomenoj kaj teologiaj dogmoj, kiuj ĝis antaŭ nelonge estis elmensigitaj kiel relikvoj de epoko malklera, nun ree trovas sin solene, ofte senkritike esplorataj en influhavaj medioj. En multaj landoj la religiaj konfesoj transprenas novan kaj decidan signifon je la kandidatiĝoj por politikaj oficoj. Tiu mondo, kiu supozis ke per la falo de Berlina Muro

aŭroris epoko de internacia paco, estas nun avertata ke ĝi troviĝas en milito de civilizacioj kies difiniaj trajtoj estas nepacigeblaj religiaj antipatioj. Libro-vendejoj, magazinaj kioskoj, hejmpaĝoj kaj bibliotekoj penas kontentigi evidente nesatigeblan publikan apetiton je informoj pri religiaj kaj spiritaj temoj. La eble plej insista faktoro kaŭzanta tiun ĉi ŝanĝiĝon estas la hezito rekoni ke ne ekzistas kredinda anstataŭanto por religia kredo kiel forto kapabla generi memregadon kaj restarigi sindevidon al morala konduto.

<sup>6</sup> Preter la atento, kiun formala religio ree akiras, reviviĝas vasta spirita serĉado. Esprimiĝanta plej kutime kiel strebadoj trovi personan identecon transcendantan nure fizikan, tiu evoluo nutras tre variajn klopodojn kaj pozitivajn kaj negativajn. Unuflanke la strebadoj al justeco kaj la apogado de la provoj starigi internacian pacon tendencas krome vekti novan konscion pri la rolo de la individuo en la socio. Simile, kvankam fokusita je la mobilizado de subtenado por ŝanĝoj je la sociaj decidfaraj procedoj, movadoj kiel la ekologia kaj la feminisma instigas al rekonsiderado de memperceptoj kaj vivceloj. Novdirektiĝo okazanta en ĉiuj religiaj komunumoj estas la kreskanta transiro de kredantoj el tradiciaj branĉoj de sia origina kredo al sektoj donantaj prioritaton al la spirita serĉado kaj persona spertado de siaj membroj. Je la mala poluso eksterteraj vidaĵoj, mem-malkovraj praktikoj, retiriĝoj al sovaĝejoj, karismaj ekzaltiĝoj, variaj Nov-Epokaj entuziasmoj, kaj la konscionlevanta efiko atribuita al narkotikaĵoj kaj halucinaĵoj altiras adeptojn ege pli multnombrajn kaj pli diversecajn ol iam ajn siatempe spiritualismo aŭ teozofio sukcesis altiri je simila historia turnopunkto antaŭ jarcento. Por bahaano la dismultiĝo eĉ de kultoj kaj praktikoj, kiuj eble ĉe multaj vekas antipation, estas unuavide indiko por la evidento entenata en la praa rakonto pri Maĵnun, kiu kribris la polvon serĉante sian amatan Lejli kvankam konscia ke ŝi ja estas pura spirito: „Serĉadas ŝin mi ĉie ajn, ke bonŝance ie ajn mi ŝin trovos.“<sup>1</sup>

**L**a revekiĝinta interesiĝo pri religio evidente ankoraŭ tute ne atingis sian kulminon – rilate nek la eksplicite religiajn nek la malpli difineblajn spiritajn manifestiĝojn. Male. La fenomeno estas produkto de historiaj fortoj

konstante pli impetiĝantaj. Ilia komuna efiko estas eroziado de tiu certeco, kiun la dudeka jarcento heredis al la mondo, nome ke la realo estas fine nenio alia ol sole materia ekzistado.

<sup>8</sup> La plej evidenta kialo por tiaj novprikaksadoj estas la bankroto de la materiisma entrepreno mem. Dum pli ol cent jaroj la ideo de progreso estis identigata kun ekonomia evoluo kaj kun ĝia kapablo generi kaj formi socian pliboniĝadon. Ekzistantaj opiniaj diferencoj ne defiis tiun mondpercepton mem sed nur unuopajn konceptojn pri kiel plej bone atingi ĝiajn celojn. Ĝia plej ekstrema formo, la fera dogmo de „sciencia materiismo“, provis reinterpreti pere de siaj stretaj nocioj ĉiun aspekton de la historio kaj homa evoluo. Kiaj ajn homamaj idealoj eble inspiris iujn el ĝiaj fruaj favorantoj – la ĝenerala konsekvenco estis la starigo de totalismaj reĝimoj pretaj uzi ajnajn, ankaŭ perforte devigajn rimedojn por reguligi la vivojn de la de ili regataj malfeliĉaj popoloj. La altentenata celo uzata por pravigi tian misuzon estis la kreado de novspeca socio kiu garantius ne nur liberigon el povreco sed ankaŭ kontentigon de la homa spirito. Fine, post ok jardekoj da daŭre pliiĝanta stultaĵo kaj brutalo, kolapsis la tiumovada aspiro gvidi al la estonteco de la homaro.

<sup>9</sup> Aliaj sistemoj de socia eksperimentado ja rifuzis utiligon de malhomecaj metodoj sed tamen derivis sian moralan kaj intelektan impeton el same limigitaj konceptoj pri la ekzistado. Enradikiĝis la opinio ke, ĉar homoj estus esence egoismaj aktoroj rilate al sia ekonomia bonfarto, la konstruado de justaj kaj prosperaj socioj certigeblus per iu aŭ alia sistemo priskribita kiel moderniga. La finaj jardekoj de la dudeka jarcento tamen dronis sub peziĝanta ŝarĝo kiu evidentigis la malon: la kolapso de la familia vivo, daŭre multiĝantaj krimoj, misfunkciaj edukaj sistemoj kaj tuta katalogo da aliaj sociaj malsanoj memorigas la tristan averton de Bahá'u'lláh pri la minacanta kondiĉo de la homa socio: „Tia estos ĝia sorto ke malkovri ĝin nun ne konvenus nek decus.“<sup>2</sup>

<sup>10</sup> La sorto de tio kion la mondo eknomis socia kaj ekonomia evoluo ne lasas dubon ke eĉ la plej idealismaj motivoj ne kapablas korekti la fundamentajn difektojn de materiismo. Naskiĝinta el la postmilita kaoso de la Dua Mondmilito „evoluo“ fariĝis la multe plej vasta kaj plej ambicia kolektiva entrepreno kiun iam ajn la homaro provis realigi. Ĝiaj homamaj motivoj samgrandis kiel ĝiaj enormaj materiaj kaj teknikaj

<sup>1</sup> Bahá'u'lláh referas al la praa persa kaj araba rakonto pri Maĵnun kaj Lejli, *The Seven Valleys* (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1991), p. 6

<sup>2</sup> *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh* (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1983) 61

investoj. Kvindek jarojn poste, dum agnoskendas la impresaj rezultoj de evoluado, la entrepreno, se juĝi ĝin laŭ siaj propraj normoj, devas esti konsiderata kiel senkuraĝiga malsukceso. Tiu ĉi kolektiva fortostreĉo ekiĝinta kun tiel altaj esperoj ne nur ne sukcesis malgrandigi la breĉon inter la bonfarto de la eta parto de la homaro ĝuanta la avantaĝojn de moderneco kaj la larĝaj popolamasoj troviĝantaj en la marĉo de senespera malriĉeco – ĝi devis observi kiel male tiu breĉo plivastiĝis al abismo.

<sup>11</sup> La konsumisman vivstilon, la nuntempe pro manko de io alia postrestinta heredanto de la materiisma evangelio de la plibonigado de la homaj aferoj, ne ĝenas la efemera karaktero de la ĝin inspirantaj celoj. Por la eta minoritato, kiu povas ilin al si permesi, la avantaĝoj estas tujaj kaj ĝi ne vidas la neceson ilin pravigi. Aŭdacigiĝinta pro la disfalo de tradicia moralo, la antaŭeniĝo de la nova kredo esence estas nenio alia ol la triumfo de animalaj impulsoj, instinktaj kaj blindaj kiel manĝemo, kaj nune senkatenitaj el la restriktaj de transnaturaj sankcioj. Ĝia plej evidenta viktimo estas la lingvaĵo. Inklinoj, iam ĝenerale riproĉataj kiel morale misaj, mutaciis al antaŭkondiĉoj por socia progreso. Egoismo fariĝis aprezata komerca resurso; mensogado sin reinventis kiel publika informado; diversspecaj perversoj senhonte arogas al si la statuson de homrajto. Kamuflitaj sub respektivaj eŭfemismoj akiras avaro, avido, nenifaro, orgojlo – eĉ perforto – ne nur vastan akcepton sed socian kaj ekonomian valoron. Kaj kiel perdis sian sencon la vortoj tiel, ironie, ĝin ankaŭ perdis tiuj materiaj komfortoj kaj atingoj por kiuj la vero estas senzorge ofertata.

<sup>12</sup> Klare, la eraro de la materiismo ne estas la laŭdindaj klopodoj plibonigi la vivkondiĉojn sed la etmensa kaj malprava memfido kiu ĝian mision difinis. La graveco de materia prosperado kaj de la scienca kaj teknologia antaŭeniĝo necesa por ĝin atingi estas temo vaste traktata en la skriboj de la Baha Kredo. Tamen, kiel dekomence neeviteblis, el la arbitraj klopodoj separi tian fizikan kaj materian bonfarton disde la spirita kaj morala evoluo de la homaro rezultis la perdo de la lojaleco kaj fideleco de ĝuste tiuj popolamasoj al kiuj pretendas servi la materiisma kulturo. „Atestu kiel la mondon ĉiutage afliktas freŝa katastrofo“, avertas Bahá'u'lláh. „Ĝia malsano proksimiĝas al stato de plena malespero, ĉar la vera Kuracisto estas malhelpata apliki sian kuracilon dum stultaj fuŝuloj konsideratas favore kaj ricevas plenan liberon agi.“<sup>3</sup>

Ŝanĝa forto subfosanta la miskoncepitojn pri la realo kaj portinta la homaron en la dudekunuan jarcenton estas, krom la seniluziigo pri la promesoj de la materiismo, la tutmonda integriĝo. Sur la plej simpla nivelo tiun konsistigas progresoj komunikteknologiaj kiuj malfermas la vojon al vasta interagado inter la diversaj popoloj sur la planedo. La ĝenerala aliro al informoj, krom faciligi interpersonan kaj intersocian interŝanĝon, transmutacias la historie akumulitan lernadon, kio ĝis antaŭ nelonge estis privilegio rezervita por elitoj, al posedaĵo heredata de la tuta homa familio – sen distingo laŭ nacio, etno aŭ kulturo. Malgraŭ ĉiaj krudaj maljustecoj konservataj – fakte intensigataj – per la tutmonda integriĝo, ĉiu boninformita observanto devas agnoski ke tiu transformado stimulis repripensadon de la realo. Kaj kun la pripensado venis priduboj: kritike ekzamenatas ĉiaj establita aŭtoritatoj, ne plu nur religiaj kaj moralaj, sed ankaŭ registaraj, akademaj, komercaj, amaskomunikilaj kaj, pli kaj pli, sciencaj.

<sup>14</sup> Multe pli rekte ol teknologiaj faktoroj nian pensadon influas la unuiĝo de la planedo. Ne trotakseblas ekzemple la efiko de amasa tutmonda vojaĝado je la elformado de tutmonda konscio. Pli grandaj ankoraŭ estis la konsekvencoj de enormaj migradoj kiujn vidis la mondo dum tiu jarcento kaj duono ek de kiam la Báb deklaris Sian mision. Milionoj da rifuĝantoj provantaj eskapi persekutadon kiel tajdaj ondoj dise inundis aparte Eŭropon, Afrikon kaj Azion. Apud la suferoj kaŭzitaj de tiaj tumultoj ekvideblas la pliiĝanta integriĝo de la mondaj etnoj kaj kulturoj al nova civitanaro de unu sola tutmonda hejmlando. Rezulte ĉiadevenaj homoj devas fronti kulturojn kaj normojn, pri kiuj iliaj antaŭuloj sciis apenaŭ ion aŭ nenion, kaj estas pro tio neeviteble instigataj serĉi komprenon kaj sencon.

<sup>15</sup> Ne eblas imagi kia malsama la historio de la pasinta jarcento kaj duono estintus se iu el la gvidaj estroj de la mondaj aferoj, al kiuj sin turnis Bahá'u'lláh, prenintus la tempon pripensadi la mondkoncepton pravigitan per la morala legitimaĵo de ĝia Aŭtoro, legitimaĵo kian ili pretendis alte estimi. Bahaano ne povas pridubi ke la transformadoj anoncigitaj en la mesaĝo de Bahá'u'lláh, spite tion ke la mondestroj Lin malatentis, nerezisteble efektiviĝas. Tra kunhavataj malkovroj kaj partoprenado en suferoj de aliaj, nun homoj el diversaj kulturoj malkovras la komunan homaron troviĝantan rekte sub la surfaco el imagitaj identecaj malsamecoj. Ĉu obstine rifuzata en kelkaj socioj aŭ bonvenigata aliloke kiel liberiĝo

<sup>3</sup> Samloke 16:3

el sensencaj kaj sufokaj limiĝoj – la sento ke la enloĝantoj de la Tero estas fakte „la folioj de unu arbo“<sup>4</sup> malrapide fariĝas la normo laŭ kiu estas juĝataj la kolektivaj fortostreĉoj de la homaro.

<sup>16</sup> La perdo de kredo je la promesoj de materiismo kaj la akceliĝanta tutmondiĝo de la homa spertado reciproke sin fortigas je tio ke ili vekas novan deziron kompreni la mondon kaj vivon. Bazaj valoroj estas pridubataj; parokaj apartenoj ne plu ligas; iam nepenseblaj postuloj akceptatas. Estas tiu ĉi universala renversiĝo, klarigas Bahá'u'lláh, kiun la skriboj de pasintaj religioj metafore nomis „la Tagon de Resurekto“: „La voko laŭtis kaj la popoloj eliĝas el siaj tomboj kaj leviĝante ĉirkaŭrigardas.“<sup>5</sup> Preter ĉiaj distaŭz-adoj kaj suferadoj la procezo estas esence spirita: „La brizo de l' Ĉio-Kompata blovetis kaj estas vigligataj la animoj ene de siaj korpaj tomboj.“<sup>6</sup>

**T**ra la historio la primaraj faktoroj de spirita evoluado estis la grandaj religioj. Por la plejmulto de la tutmonda populacio la skriboj de ĉiu el tiuj kredosistemoj servis, en la vortoj de Bahá'u'lláh, kiel „la Urbo de Dio“<sup>7</sup>, kiel fonto de scio plene ampleksanta la konscion kaj tiel konkera ke ĝi dotis la sincerulojn per „nova okulo, nova orelo, nova koro kaj nova menso“<sup>8</sup>. Vasta literaturo, al kiu kontribuis ĉiuj kulturoj, atestas pri la transcendo kiun spertis kaj raportis generacioj da serĉantoj. Tra la jarmiloj la vivoj de tiuj respondintaj al la voĉo de l' Dia inspiris en muziko, arkitekturo kaj aliaj artoj al senspirigaj atingoj senfine eĥantaj al milionoj da iliaj kunkredantoj la spertadon de la animo. Neniu alia forto ekzistanta kapablis eltiri el la homoj kompareblajn kvalitojn heroajn, sinoferajn kaj memdisciplinajn. Socinivele la rezultantaj moralaj principoj ripete tradukiĝis al universalaj leĝaj kodoj reguligantaj kaj levantaj interhomajn rilatojn. El tiu perspektivo la ĉefaj religioj konsistigas la primaran impeton de la civiliza procezo. Aserti alion nur pruvas ignoradon de historiaj evidentoj.

<sup>18</sup> Kial, do, tiu ĉi riĉega heredaĵo ne servas kiel la centra bazo por la hodiaŭa revekiĝo de spirita serĉado? Periferie seriozaj provoj faratas cele al reformulado de tiuj instruoj kiuj fundamentis la respektivajn kredojn kun la espero ke tiel ili reakiras altirpovon; sed plejparte tiu serĉado de signifo kaj senco estas difuza, individuisma kaj nekohera. La skriboj tamen ne ŝanĝiĝis; la moralaj principoj entenataj en ili sian validon ne perdis. Neniu sincere turniĝanta al la Ĉielo, kaj persistanta, malsukcesos detekti respondan voĉon en la Psalmoj aŭ en la Upaniŝadoj. Iu ajn nur iome spertanta la Realecon transcendantan tiun ĉi materian realon estos kore tuŝata de la vortoj per kiuj Jesuo aŭ Budho tiel intime parolas pri ĝi. La apokalipsaj vizioj de la Korano plu provizas konvinkan konfirmon al ĝiaj legantoj ke la efektivigo de justeco estas kerna Dia intenco. Ankaŭ estas, en siaj esencaj trajtoj, la vivoj de la herooj kaj sanktuloj hodiaŭ ne malpli signifoplenaj ol kiam antaŭ jarcentoj ili estis vivataj. Por multaj religioj tial la plej dolora aspekto de la nuntempa civilizacia krizo estas ke la serĉado de vero ne konfide direktiĝas al la bonkonataj vojoj religiaj.

<sup>19</sup> La probleme estas, evidente, duflanka: La per racio dotita animo ne nur okupas privatan sferon sed estas aktiva partoprenanto en socia ordo. Kvankam la veroj ricevitaj el la grandaj religioj restas validaj, la ĉiutagaj travivaĵoj de individuo dudekunjarcenta estas tamen neimageble malsamaj ol tiuj kiujn li aŭ ŝi travivintus en iu el la epokoj en kiuj tiu vivgvido estis revelaciita. Demokrataj decidprocedoj ĝisfunde transformis la rilaton de la unuopulo al aŭtoritato. Kun kreskanta konfido kaj sukceso virinoj juste insistas pri la rajto de plena egaleco kun viroj. Sciencaj kaj teknologiaj revolucioj ŝanĝas ne nur la funkciadon de sed ankaŭ la koncepton pri la socio, fakte de la ekzistado mem. Universala edukado kaj eksploda estiĝo de novaj kampoj da kreado malfermas la vojon al ekkonoj kiuj stimulas socian mobilecon kaj integriĝon kaj generas eblecojn al kies plena eluzado kuraĝigas la civitanojn la sekureco garantiata per leĝaro. Hemoblasta esplorado, nuklea energio, seksa identeco, ekologia streso kaj la demando kiel utiligi la financajn rimedojn rezultigas, almenaŭ, sociajn demandojn senprecedencajn. Tiuj, kaj la ceteraj sennombraj ŝanĝiĝoj influantaj ĉiun sferon de la homa vivo, estigis novan mondon da ĉiutagaj ebloj elekti por kaj la socio kaj ĝiaj membroj. Kio ne ŝanĝiĝis estas la neeskapebla bezono elekti kaj decidi – ĉu al bono ĉu al malbono. Jen kie plej klare fokusiĝas la spirita

<sup>4</sup> Tablets of Bahá'u'lláh revealed after the Kitáb-i-Aqdas (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1988) 3:26

<sup>5</sup> Gleanings 17,4

<sup>6</sup> Bahá'u'lláh, Epistle to the Son of the Wolf (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1988), p. 133

<sup>7</sup> Bahá'u'lláh, The Kitáb-i-Íqán (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1993) 216

<sup>8</sup> Samloke

karaktero de la nuntempa krizo, ĉar la plej multaj decidoj necesaj estas ne nur praktikaj sed ankaŭ moralaj. Grandparte tial la perdo de tradicireligia kredo estas neevitebla konsekvenco el la malsukceso trovi en ĝi la gvidadon bezonatan por vivi en la moderna sukceso kaj kun certeco.

<sup>20</sup> Dua barilo al restariĝo de la hereditaj kredosistemoj responde al la spirita sopirado de la homaro estas la jam menciitaj efikoj de la tutmonda integriĝo. Sur la tuta planedo homoj edukitaj en certa religia referenckadro abrupte sin trovas en rekta najbareco kun aliaj kies kredoj kaj praktikoj unuarigarde ŝajnas esti tiel malsamaj ke neakordeblas kun la propraj. La diferencoj povas kaŭzi kaj fakte ofte kaŭzas defendiĝemon, flagrantan rankoron kaj akutajn konfliktojn. Tamen, multkaze ja la efiko estas ne tio sed rekonsiderado de transprenitaj doktrinoj kaj ekkuraĝo klopodi komunajn valorojn trovi. Sendube multo el la apogo kiun ĝuas variaj interreligiaj aktivecoj ŝuldiĝas al tiaspecaj reagoj ene de la ĝenerala publiko. Neeviteble el tiaj aliroj rezultas pridemando de tiaj religiaj doktrinoj kiuj malhelpas interamikiĝon kaj interkompreniĝon. Se homoj kies kredo ŝajnas esti fundamente malsama de la propra malgraŭ tio kondukas vivon tiel moralan ke tio meritas admiron – kio do igas la propran kredon supera? Kaj ĉu ne riskas sektecaj sintenoj nur plifortigi nedeziratajn barojn inter individuoj kaj iliaj najbaroj, se, alternative, ĉiuj grandaj religioj dividas kune certajn bazajn valorojn?

<sup>21</sup> Tial hodiaŭ malmultaj el tiuj certagrade familiaraj kun tiu situacio tenas la iluzion ke iu el la establita religiaj sistemoj de la pasinteco kapablos transpreni la rolon de finfina gvidanto de la homaro tra la problemoj de la moderna vivo – eĉ ne en la neprobabla kazo ke ĝiaj malsamaj sektoj tiucele kuniĝus. Ĉiu unuopa el tiuj kiuj ĝenerale konsideratas kiel sendependa religio trovas sin certaforme modlita per siaj aŭtoritataj skriboj kaj sia historio. Ĉar ili ne povas simple reskulpti sian kredosistemon en maniero legitimebla el la aŭtoritataj vortoj de siaj Fondintoj, ili same ne povas adekvate respondi la multajn demandojn rezultantajn el la socia kaj intelekta evoluado. Tio eble multajn ĉagrenas; sed ja estas nenio alia ol imanenta eco de la evoluada procezo. Iaj provoj de perforta renversado povas nur konduki al ankoraŭ pli granda seniluziĝo pri religio mem kaj nur pliseverigos sektajn konfliktojn.

La dilemo estas kaj artefarita kaj memproduktita. La mondan ordon, se tiel ĝi nomeblas, ene de kiu bahaanoj hodiaŭ klopodas dividi kun aliaj la mesaĝon de Bahá'u'lláh, karakterizas konceptoj pri la homa naturo kaj pri socia evoluado tiel fundamente misaj ke ili severe malhelpas eĉ la plej inteligentajn kaj bonintencajn penadojn antaŭenigi la homan ekzistadon. Aparte tio validas koncerne la konfuzon regantan ĉirkaŭ praktike ĉiuj aspektoj de la religio. Por ke ili povos adekvate respondi al la spiritaj bezonoj de siaj proksimuloj, bahaanoj devas akiri profundan komprenon pri la rilataj problemoj. La por tiu defio bezonata mensa streĉiĝo takseblas se oni konsciigas al si la eble plej ripete kaj urĝe rediratan admonon en la skriboj de ilia Kredo: ke ili „meditu“, „cerbumu“, „pripensu“.

<sup>23</sup> Estas banala populara opinio ke la nocio „religio“ staras por la multaj nuntempe ekzistantaj sektoj. Ne povas surprizi ke tiu opinio tuj ĉe iuj vekas la proteston ke religio pli ĝuste staras por unu aŭ alia el la grandaj, sendependaj historiaj kredosistemoj, kiuj formis kaj inspiris tutajn civilizaciojn. Tiu ĉi vidpunkto siavice tamen konfrontiĝas kun la neevitebla demando kie do en la nuna mondo oni trovu tiujn historiajn kredojn. Kie, precize, troviĝas „Judismo“, „Budhismo“, „Kristanismo“, „Islamo“ kaj la aliaj? Ĉar, evidente ili ne povas esti identigitaj kun la nepacigeble inter si oponantaj organizaĵoj kiuj pretendas ilianome paroli aŭtoritate. Sed tie ankoraŭ ne finiĝas la problemo. Preskaŭ certe ankoraŭ alia respondo al tiu demando estas ke religio simple staras por certa vivsinteno, certa rilato al Realeco kiu transcendas la materian ekzistadon. Religio, tiel komprenata, estas atributo de individuo, impulso ne organiziĝema, spertado universale havebla. Al tia sinteno por plimulto el la religiemuloj tamen mankas ĝuste tiuj discipliniga aŭtoritato kaj unuiga efiko kiuj donas signifon al religio. Iuj objektantoj eble eĉ argumentas ke male religio estas vivstilo de personoj kiuj, kiel ili mem, obeas severan reĝimon de ĉiutaga ritaro kaj abnegacio, kio lokas ilin tute ekster la ceteran socion. Komunas je ĉiuj tiuj malsamaj konceptoj la iom-post-ioma provo enprizonigi fenomenon – malgraŭ ke oni ja agnoskas ke ĝi komplete transcendas la homan perceptkapablon – per konceptaj limoj home inventitaj, ĉu organizaĵaj, teologiaj, empiriaj aŭ ritaj.

<sup>24</sup> La instruoj de Bahá'u'lláh tiun ĉi implikon el nekoheraj opinioj tratanĉas kaj, tiel farante, reformulas multajn verojn kiuj, ĉu eksplicite aŭ implicite, medolis ĉe ĉiuj Diaj revelacioj. Kvankam

tio neniel komplete redonas Lian intencon, Bahá'u'lláh klarigas ke provoj enkateni kaj priskribi la Realon de Dio en katekismoj aŭ konfesioj estas nenio alia ol simple memtrompado. „Al ĉiu perceptanta kaj lumigita koro estas evidente, ke Dio, la nekonebla Esenco, la sankta Estaĵo, estas altege ekzaltita super ĉiu homa atributo kiel korpa ekzisto, ascendo kaj descendo, eliro kaj eniro. Fore de Lia gloro estu, ke homa lango povus celebri adekvate Lian laŭdon aŭ homa koro kompreni Lian nesondeblan misteron.“<sup>9</sup> La instrumentoj tra kiuj la Kreanto de ĉiuj aferoj interagis kun la daŭre evoluanta kreaĵo kiun Li estigis estas la aperigado de profetaj Figuroj kiuj manifestas la atributojn de nealirebla Dieco: „Ĉar la pordo al la ekkono de la Prahonora de l' Tagoj estas fermita antaŭ la vizaĝo de ĉiuj estaĵoj, la Fonto de senfina graco ... faris, ke tiuj lumaj Gemoj de Sankteco aperadis el la regno de la spirito en la nobla formo de la homa templo kaj manifestiĝis al ĉiuj homoj, por ke ili komuniku al la mondo la misterojn de la neŝanĝebla Estaĵo kaj rakontu pri la subtiloj de Lia nepereonta Esenco.“<sup>10</sup>

<sup>25</sup> Arogi al si juĝi inter la Mesaĝistoj de Dio, levi unu super alian, signifus sindono al la iluzio ke la Eterna kaj Ĉion-Entenanta povus esti objekto de la kapricoj de homaj preferoj. „Klaras kaj evidentas al vi“, estas la precizaj vortoj de Bahá'u'lláh, „ke ĉiuj Profetoj estas la Temploj de la Afero de Dio, Kiuj aperis vestitaj en diversaj kostumoj. Se rigardas vi kun okulo distinga, ekkonos vi ke Ili ĉiuj loĝas en la sama tabernaklo, soras en la saman ĉielon, sidas sur la sama trono, eldiras la saman parolon kaj proklamas la saman Kredon.“<sup>11</sup> Imagi, krome, ke eblas – aŭ necesas – la naturon de tiuj ĉi unikaj Figuroj limigi al teorioj luitaj el la empirio estas same aroga. La signifo de „koni Dion“ estas, klarigas Bahá'u'lláh, scii pri la Manifestiĝoj, Kiuj rivelas Liajn volon kaj atributojn. Kaj ĝuste tiel la animo intime renkontas Kreanton Kiu aliel troviĝas ekster kaj priskribeblo kaj perceptebla: „Mi atestas“, asertas Bahá'u'lláh pri la stato de la Manifestiĝo de Dio, „... ke tra Via beleco la beleco de la Adorato senvualiĝis kaj tra Via vizaĝo la vizaĝo de la Dezirata disradias...“<sup>12</sup>

<sup>26</sup> Religio, tiel komprenata, vekas en la animo latentajn eblojn aliel neimageblajn. Individuo povas pli kaj pli elmontri la atributojn de la Dia mondo laŭ la grado laŭ kiu li lernas utiligi la influon de la

revelacio de Dio por lia epoko: „Per la Instruoj de tiu ĉi Tagstelo de Vero“, klarigas Bahá'u'lláh, „ĉiu homo antaŭeniĝos kaj evoluos ĝis kiam li ... povas manifesti ĉiujn latentajn kapablojn per kiuj lia plej interna vera memo estas dotita.“<sup>13</sup> Ĉar la destino de la homaro enkludas la antaŭenportadon de „ĉiam progresanta civilizacio“<sup>14</sup>, estas ne la plej malgranda el la eksterordinaraj povoj kiujn posedas religio ĝia kapablo liberigi el la limigoj de eĉ la tempo tiujn kiuj kredas, igante ilin fari oferojn favore al generacioj de jarcentoj venontaj. Fakte la vekigo de la animo al sia vera naturo donas al ĝi, ĉar ĝi estas senmorta, la forton servi al la evolua procezo ne nur en tiu ĉi mondo sed pli rekte eĉ en la mondoj venontaj: „La lumo kiun tiuj animoj disradias“, asertas Bahá'u'lláh, „estas responsa por la progreso de la mondo kaj la antaŭeniĝo de ĝiaj popoloj... Ĉiuj aferoj necese devas havi kaŭzon, impetan forton, vivigan principon. Tiuj ĉi animoj kaj simboloj de abnegacio provizis kaj daŭre provizos la plej altan ŝanĝan impulson al la mondo de l' estado.“<sup>15</sup>

<sup>27</sup> Kredi tiel estas necesa kaj neelradikebla bezono de nia specio. Influa moderna pensanto ĝin priskribis kiel „evoluo konsciiĝinta pri si mem“<sup>16</sup>. Se, kiel tion triste kaj konvinke pruvas la eventoj de la dudeka jarcento, la natura esprimiĝo de kredado estas arbitre blokata, ĝi inventas adorobjektojn kiel ajn maldecajn – aŭ eĉ malnobligajn – por per tiuj iagrade kontentigi la sopiradon je certeco. Estas impulso kiun ne eblas nei.

<sup>28</sup> Kurte, tra la daŭranta procezo de revelaciado Tiu Kiu estas la Fonto de tiu sciosistemo, kiun ni nomas religio, demonstras la integron de la sistemo mem kaj ke ĝi malhavas la kontraŭdirojn kiujn al ĝi trudas sektaj ambicioj. La laboro de ĉiu Manifestiĝo de Dio havas aŭtonomecon kaj aŭtoritaton kiuj transcendas prijuĝon; ĝi ankaŭ markas stadion en la senlima disvolviĝo de unusola Realeco. Ĉar la intenco de la sinsekvaj revelacioj de Dio estas veki en la homaro ĝiajn kapablojn kaj responsojn kiel kuratoro de la kreaĵo, tial la procezo ne simple estas ripetiganta sed progresanta kaj estas plene aprezata nur kiel tia.

<sup>9</sup> Samloke 104

<sup>10</sup> Samloke 106

<sup>11</sup> Gleanings 22:3

<sup>12</sup> Prayers and Meditations by Bahá'u'lláh (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1987), p. 311

<sup>13</sup> Gleanings 27:5

<sup>14</sup> Samloke 109:2

<sup>15</sup> Samloke 81

<sup>16</sup> Julian Huxley, citita de Pierre Teilhard de Chardin, *The Phenomenon of Man* (London: William Collins Sons & Co. Ltd., 1959), p. 243. Vidu ankaŭ Julian Huxley, *Knowledge, Morality, and Destiny* (New York: Harper & Brothers, 1957), p. 13



<sup>29</sup> Neniel bahaanoj povas aserti ke je tiu ĉi frua horo jam ili komprenas pli ol nur etan onon el la veroj entenataj en la revelacio sur kiu baziĝas ilia Kredo. Referante, ekzemple, al la disvolviĝo de la Afero, la Gardanto diris: „Kion ni nur povas racie provi estas klopodi brileton kapti de la unuaj lumstrioj de la promesita Aŭroro kiu, kiam venintos la tempo, devos nepre forpeli la mallumon kiu envolvis la homaron.“<sup>17</sup> Tiu ĉi fakto, krom postuli humilon, ankaŭ servu kiel konstanta rememorigo ke Bahá'u'lláh ne starigis novan religion kiu enviciĝu inter la nuntempa multeco da sektaj organizaĵoj. Pli ĝuste Li reformulis la tutan koncepton de religio kiel la primara forto instiganta evoluadon de la konscio. Ĉar la homaro malgraŭ ĉia sia diverseco estas tamen unusola specio, tial la interveno, per kiu Dio kultivas la mensajn kaj korajn kvalitojn kiuj latentas en tiu ĉi specio, estas same unusola procezo. Ĝiaj herooj kaj sanktuloj estas la herooj kaj sanktuloj de ĉiuj stadioj kaj scenejoj de tiu penado kaj ĝiaj sukcesoj tiuj de ĉiuj stadioj kaj scenejoj. Tiun normon demonstris per Sia vivo kaj laboro la Majstro kaj ĝin hodiaŭ ekzemplodone elmontras bahaa komunumo kiu fariĝis la heredanto de la tuta spirita legaco de la homaro, legaco egale alirebla por ĉiuj popoloj de la mondo.

<sup>30</sup> La ripetiganta pruvo de la ekzisto de Dio tial estas ke ekde tempo nememorebla Li ree kaj ree Sin manifestis. Pli larĝasence, kiel klarigas Bahá'u'lláh, la vasta epopeo de la homara historio religia reprezentas la plenumiĝon de la „Interligo“, de tiu daŭra promeso per kiu la Kreanto de ĉio al la homaro certigas la perfektan gvidadon esencan por ĝia evoluo spirita kaj morala kaj per kiu Li ĝin alvokadas internigi kaj elmontri tiujn valorojn. Ĉiu povas, se tiel li volas, per historieska interpretado disputi pri kiomgrada estis la influo de la unika rolo de iu aŭ alia el la Mesaĝistoj de Dio, sed tia spekulativado ne helpas je pritakso de tiuj disvolviĝoj kiuj decide por la socia evoluo transformis la pensadon kaj ŝanĝis la homajn interrilatojn. Je intervaloj tiel maloftaj ke la konataj fingre nombrebilas la Manifestiĝoj de Dio aperis. Neniu el ili lasis dubojn pri la aŭtoritato de Siaj instruoj kaj ili ĉiuj elmontris je la antaŭeniĝo de la civilizacio tian influon ke ĝi nekompareble superas tiun de iu ajn alia historia fenomemo. „Vidu la horon, kiam la plejalta Manifestiĝo de Dio revelacias Sin al la homoj“, atentigas Bahá'u'lláh: „Antaŭ ol venas tiu ĉi horo, la Praglora Estaĵo, Kiu

estas ankoraŭ nekonata al la homoj kaj ankoraŭ ne proklamis la Vorton de Dio, estas Mem la Ĉioscia en mondo, en kiu ekzistas neniuj, kiu konas Lin. Li vere estas la Kreanto sen kreaĵo.“<sup>18</sup>

La plej ofta objeto kontraŭ la koncepto de progresanta religio estas la aserto ke la diferencoj inter la revelaciitaj kredoj estas tro fundamentaj ol ke eblus ilin prezenti kiel stadioj aŭ aspektoj de unusola unueca verosistemo – tio perfortus la faktojn, estas la objeto. Komprenblas tia reago pro la konfuzo pri tio kio entute estas religio. Ĉefe, tamen, tia objeto por bahaanoj estas invito la tie ĉi prezentatajn principojn pli eksplicite meti en la evoluo-kuntekston provizitan en la skriboj de Bahá'u'lláh.

<sup>32</sup> La asertataj diferencoj estas aŭ praktikaj aŭ doktrinaj. Kaj pri ambaŭ diferencoj oni opinias ke ili estas intencataj en la rilataj skriboj. Koncerne la religiajn kutimojn, kiuj direktas la personan vivon, helpas komprenigi tion al si antaŭ la fono de kompareblaj vivaspektoj materiaj. Ja oni apenaŭ plu serioze konsideras diversecon – kiel ajn evidenta ĝi eble estas – de higieno, vestado, manĝado, transporto, militado, konstruado aŭ ekonomiaj aktivecoj kiel pruvon de teorio ke la homaro ne estas fakte unu specio, unusola unika popolo. Ĝis la komenco de la dudeka jarcento tiaj simplismaj argumentoj estis normalaj, sed historia kaj antropologia esplorado nun provizas klaran panoramon de la kulturevolua procezo per kiu tiuj kaj sennombraj aliaj esprimiĝoj de la homa kreivo estiĝis, transdoniĝadis tra la sinsekvaj generacioj, trapasis metamorfozojn kaj ofte disvastiĝis kaj ankaŭ en foraj landoj riĉiĝis homajn vivojn. Ke la hodiaŭaj socioj prezentas vastan gamon da tiaj fenomenoj tial neniuj difinas fiksan kaj neŝanĝeblan identecon de iuj popoloj, sed nur montras kiun stadion certa populacio ĵus trapasas – aŭ ĝis antaŭ nelonge estis trapasanta. Krome ĉiuj tiuj kulturaj fenomenoj nun fluidiĝas sekve de la premado de la tutmonda integriĝo.

<sup>33</sup> La religian vivon de la homaro, indikas Bahá'u'lláh, karakterizis simila evolua procezo. La difina malsimileco troviĝas en la fakto ke, pli ol simple reprezenti la hazardajn rezultojn de la daŭra historia metodo provi kaj erari, tiuj normoj estas eksplicite preskribitaj en ĉiu unuopa kazo kiel integra ero de unu aŭ alia Dia revelacio, estas enkorpiĝitaj en la skriboj kaj detale kaj skrupule

<sup>17</sup> Shoghi Effendi, *The World Order of Bahá'u'lláh: Selected Letters* (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1991), p. 35

<sup>18</sup> Gleanings 78:3

konservataj tra jarcentoj. Dum certaj eroj de la unuopaj kondutkodoj iam estis plenumintaj sian rolon kaj ilin kun la paso de la tempo anstataŭis malsamaj moroj alportitaj de la socia disvolviĝado, la kodoj mem ne perdis sian aŭtoritaton dum longaj stadioj de homara progreso dum kiuj ili ludis esencan rolon je la trejnado de konduto kaj sinteno. „Tiuj ĉi principoj kaj leĝoj, tiuj ĉi firme starigitaj kaj potencaj sistemoj“, asertas Bahá'u'lláh, „devenas el unu Fonto kaj estas la radioj de unu Lumo. Ke ili diferencas unuj de la aliaj, devas esti aljuĝata al la variantaj postuloj de la epokoj, en kiuj ili estis proklamataj.“<sup>19</sup>

<sup>34</sup> Argumenti ke malsamaj reguloj, moroj kaj aliaj praktikoj signife kontraŭdiras la ideon de la esenca unueco de la revelaciitaj religioj tial maltrafas la sencon de tiuj preskriboj. Pli serioze ankoraŭ, tia argumentado pretervidas la fundamentan distingon farendan inter la eternaj kaj la portempaj aspektoj de la funkciado de religioj. La esenca mesaĝo de religio neŝanĝeblas. Ĝi estas, en la vortoj de Bahá'u'lláh, „la neŝanĝebla Kredo de Dio, eterna en la pasinteco, eterna en la estonteco.“<sup>20</sup> Estas ĝia rolo ebenigi por la animo la vojon al atingado de ĉiam pli matura rilato kun sia Kreinto kaj doti ĝin per ĉiam pli granda morala aŭtonomio je la disciplinado de la animalaj impulsoj propraj al la homa naturo. Kaj tiu ĉi ĝia rolo neniel malkongruas kun ĝia kroma provizado de preskriboj por povi atingi progresojn sur la vojo de la civilizacia procezo.

<sup>35</sup> La koncepto de progresanta revelacio metas la decidan emfazon sur la rekono de la revelacio de Dio tiam kiam ĝi aperas. Ke la homaro ne rekonis la novan revelacion je ĝia naskiĝo, tio de epoko al epoko kondamnis tutajn populaciojn al rita ripetado de ordonoj kaj praktikoj ankoraŭ longe post kiam ili estis plenumintaj sian taskon kaj plu nur vanigis moralan antaŭeniĝon. Triste, unu hodiaŭa sekvo de tia miso estas la bagateligo de religio. Je ĝuste tiu etapo de ĝia kolektiva evoluprocezo, kie la homaro komencis barakti kun la defioj de la moderno, la spirita resursoj, kiujn ĝi principe bezonus por morale fortiĝi kaj kleriĝi, rapide fariĝis celo de mokado, unue en tiuj cirkloj kiuj faras la decidojn pri la direkto de la socia evoluo kaj fine ĉiam pli vaste en la ĝenerala popolo. Povas apenaŭ mirigi tial ke tiu ĉi plej detrua el multaj fidotrompoj kiujn suferis la homa konfido, kun la paso de la tempo subfosis la fundamentojn de kredado mem. Pro tio

Bahá'u'lláh ripete urĝas Siajn legantojn profunde cerbumi pri la leciono kiun instruis tiuj ripetaj misoj: „Pripensu momenton kaj meditu pri tio kio estis la kaŭzo de tia rifuzado ...“<sup>21</sup> „Kio povus esti la kialo por tia rifuzado kaj evitado ...?“<sup>22</sup> „Kio povis kaŭzi tian disputadon ...?“<sup>23</sup> „Meditu, kio povus esti la motivo ...?“<sup>24</sup>

<sup>36</sup> Ankoraŭ pli noca por la pozicio de religio estis teologia aroganteco. Persista trajto de la sektara pasinteco de la religio estas la domina rolo kiun ludis la klerikaro. Pro manko en la sanktaj skriboj de klare difinitaj nedisputeblaj instituciaj aŭtoritatoj, sukcesis klerikaj elitoj arogi al si ekskluzivan kontrolon super la interpretado de la Dia intenco. Kiel ajn malsamis eble la motivoj – la tragikaj efikoj estis obstrukco de la inspira torento, malkuraĝigo de sendependa intelekta aktiveco, fokusiĝo je detaloj de ritoj, kaj tro ofte semado de malamo kaj antaŭjuĝoj rilate tiujn, kiuj sekvis sektan padon malsaman al tiu de la sin mem enoficigintaj spirita gvidantoj. Ja nenio povis preventi la kreaĵon povon de la Dia interveno daŭrigi sian laboron pli kaj pli levi la konscion. Sed la amplekso de tio kio atingebus en iu epoko pli kaj pli limiĝis per tiaj arbitre elpensitaj obstakloj.

<sup>37</sup> Kun la paso de la tempo la teologio sukcesis starigi en la centro de ĉiuj el la grandaj religioj aŭtoritaton paralelan – kaj eĉ laŭspirite malamikan – al la revelaciitaj instruoj sur kiuj la koncerna religio baziĝas. Tion ĉi kaj ĝiajn implikojn por la hodiaŭa tempo adresas la konata parabolo de Jesuo pri la agroposedanto kiu semis en sia agro: „Sed dum homoj dormis, lia malamiko venis kaj semis lolon meze de tritiko, kaj foriris.“<sup>25</sup> Kiam liaj servantoj proponis eltiri la lolon la agroposedanto respondis: „Ne, por ke, kolektante la lolon, vi ne elradikigu ankaŭ la tritikon. Lasu al ambaŭ kreski kune ĝis la rikolto; kaj en la tempo de la rikolto mi diros al la rikoltistoj: Kolektu unue la lolon, kaj ligu ĝin en faskojn, por bruligi ĝin; sed kolektu la tritikon en mian grenejon.“<sup>26</sup> Sur siaj paĝoj la Korano entenas severan kondamnon de la spirita noco kaŭzata de tiu ĉi hegemonio-rivalado: „Diru: Vere mia Sinjoro malpermesis la malbonajn agojn, ĉu publikajn, ĉu kaŝitajn, kaj la pekon kaj la maljustajn transpaŝojn kaj, ke estu aldonita al Allah kiel rivalo tio, por kio ne estis sendita iu ajn rajtigo,

<sup>21</sup> The Kitáb-i-Íqán 4

<sup>22</sup> Samloke 8

<sup>23</sup> Samloke 13

<sup>24</sup> Samloke 14

<sup>25</sup> Sankta Mateo 13:25

<sup>26</sup> Samloke 13:29-30

<sup>19</sup> Samloke 132:1

<sup>20</sup> Bahá'u'lláh, The Kitáb-i-Aqdas: The Most Holy Book (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1993) 182

kaj ke vi diru pri Allah, kion vi ne scias.”<sup>27</sup> Por la moderna menso estas la plej granda ironio ke generacioj da teologoj, kies trudoj formas precize tiun trompon kiun tiel forte kondamnas tiuj tekstoj, uzas ĝuste tiun averton mem kiel armilon por subpremi protestojn kontraŭ ilia uzurpado de Dia aŭtoritato.

<sup>38</sup> Rezulte ĉiu nova stadio en la progrese disvolviĝanta revelacio de spirita vero kun la tempo rigidiĝis per laŭliteraj komprenoj kaj interpretadoj, el kiuj multaj estis luitaj el kulturoj kiuj mem estis morale elĉerpitaj. Kio ajn eble estis ilia valoro dum pli fruaj stadioj en la evoluado de la konscio: konceptoj de fizika resurekto, paradizo de karnaj plezuroj, reinkarniĝo, panteismaj mirindaĵoj kaj similaĵoj hodiaŭ starigas murojn de separo kaj konflikto en epoko dum kiu la Tero fariĝis fakte unu hejmlando kaj homaj estaĵoj devas ekkompreni sin kiel ĝiaj civitanoj. En tiu ĉi kunteksto oni povas aprezi kial Bahá'u'lláh tiel arde avertis pri la baroj kiujn dogmema teologio kreas sur la pado de tiuj provantaj kompreni la volon de Dio: „Ho religiaj estroj! Ne pesu la Libron de Dio per tiuj normoj kaj sciencoj kiujn vi favoras, ĉar estas la Libro mem la senerara Pesilo starigita inter la homoj.”<sup>28</sup> Li en Sia epistolo al papo Pio IX komunikis al la pontifiko ke Dio en tiu ĉi tago „sekure konservis ... en la ujoj de justeco” ĉion ajn konservindan en la religio kaj „ĵetis en fajron kio tion meritas.”<sup>29</sup>

La menso povas, se liberigita el la vepro per kiuj la teologio ĉirkaŭheĝis religian komprenon, esplori konatajn erojn el la sanktaj skriboj tra la okuloj de Bahá'u'lláh. „Senkompara estas ĉi tago”, asertas Li, „ĉar ĝi estas kiel okulo por epokoj kaj jarcentoj pasintaj kaj kiel lumo por la tempoj malhelaj.”<sup>30</sup> La plej impona eltrovo, kiu rezultas el la avantaĝo de tiu perspektivo, estas tiu ke la sama celo kaj la samaj principoj tiriĝas tra precipe la Hebrea Biblio, la Evangelioj kaj la Korano – dum tamen ankaŭ facile troveblas iliaj ĉoj en la sanktaj skriboj de la aliaj mondaj religioj. La samaj kernaj temoj ripete

percepteblas en la teksaĵoj el preskriboj, admonoj, rakontoj, simboloj kaj interpretadoj, en kiuj ili estas metitaj. El tiuj fundamentaj veroj la klare plej distingebla estas daŭra parolado pri kaj emfaza aserto de la unueco de Dio, Kreinto de ĉio ekzistanta, ĉu en la mondo sensebla, ĉu en la sferoj ĝin transcendantaj. „Mi estas la Eternulo”, deklaras la Biblio, „kaj ne ekzistas alia; ne ekzistas Dio krom Mi”<sup>31</sup>, kaj tiu sama koncepto fundamentas la postajn instruojn de Jesuo kaj Mahometo.

<sup>40</sup> La homaro – fokuso, heredanto kaj kuratoro de la mondo – ekzistas por koni sian Kreinton kaj por servi al Lia intenco. La ennaskita homa impulso respondi al tio plej altnivele esprimiĝas tra devotado, kondiĉo el kiu sekvas plenkoraa submetiĝo al potenco rekonita kiel meritanta tian adoradon. „Nun al la Reĝo eterna, senmorta, nevidebla, la sola Dio, estu honoro kaj gloro por ĉiam kaj eterne.”<sup>32</sup> Nesebarebla de la pietato mem estas ĝia esprimiĝo en servado al la Dia intenco por la homaro. „Diru: Vere la kredo estas en la mano de Allah. Li konsentas ĝin al kiu Li volas. Allah estas indulgema, ĉioscia.”<sup>33</sup> Iluminataj per tia kompreno la responsoj de la homaro klariĝas: „Virto ne signifas turni vin orienten aŭ okcidenten”, konstatas la Korano, „sed kredi je Allah ..., kaj doni monon por la parencoj kaj por la orfoj kaj por la malriĉuloj kaj por la vojirantoj kaj por la almozuloj.”<sup>34</sup> „Vi estas la salo de la tero”<sup>35</sup>, Jesuo gravuras en la mensojn de tiuj respondintaj al Lia voko. „Vi estas la lumo de la mondo.”<sup>36</sup> La profeto Miĥa, resumante ĉi temon, kiu ree kaj ree aperas en la Hebrea Biblio kaj sekve en la Evangelioj kaj la Korano, konstatas: „...kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.”<sup>37</sup>

<sup>41</sup> Tiuj ĉi tekstoj same konsentas ke la kapablo de la animo akiri komprenon pri la intenco de sia Kreinto rezultas ne nur el propraj penadoj sed el Diaj intervenoj malfermantaj la vojon. Tion per memorinda klareco vortigis Jesuo: „Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi.”<sup>38</sup> Se en tiu ĉi aserto oni vidas ne nur dogmeman defion de aliaj etapoj de la unusola procezo de Dia gvidado, esprimas ĝi evidente centran veron de la revelaciita religio: ke aliro al tiu

<sup>27</sup> La Nobla Korano (dua eldono, tk, Kopenhago 1970) 7:34

<sup>28</sup> The Kitáb-i-Aqdas 99

<sup>29</sup> Súrat'ul-Haykal en The Summons of the Lord of Hosts: Tablets of Bahá'u'lláh (Haifa: Bahá'í World Centre, 2002) 126

<sup>30</sup> Bahá'u'lláh, citita en Shoghi Effendi, The Advent of Divine Justice (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1990), p. 79

<sup>31</sup> Jesaja 45:5

<sup>32</sup> 1. Timoteo 1:17

<sup>33</sup> La Nobla Korano 3:74

<sup>34</sup> Samloke 2:177

<sup>35</sup> Mateo 5:13

<sup>36</sup> Samloke 5:14

<sup>37</sup> Miĥa 6:8

<sup>38</sup> Sankta Johano 14:6

nekonebla Realo, kiu kreas kaj vivtenas, nur eblas tra la vekigo por la iluminado verŝita el tiu Regno. Unu el la plej ŝatataj suraĵoj de la Korano transprenas tiun metaforon: „Allah estas la lumo de la ĉieloj kaj de la tero. ... Lumo super lumo. Allah estigas similaĵon por la homoj, kaj Allah scias ĉion.“<sup>39</sup> En la kazo de la hebreaj profetoj la Dia peranto, kiu pli poste en Kristanismo aperis kiel la personeco de la Filo de homo kaj en Islamo kiel la Libro de Dio, alprenis la formon de deviga Interligo establita de la Kreinto kun Abrahamo, patriarko kaj profeto: „Kaj Mi starigos Mian interligon inter Mi kaj vi kaj via idaro post vi en iliaj generacioj, eternan interligon, ke Mi estos Dio por vi kaj por via idaro post vi.“<sup>40</sup>

<sup>42</sup> La sinsekvo de Diaj revelacioj aperas ankaŭ kiel implicita – kaj kutime eksplicita – trajto de ĉiuj ĉefaj religioj. Unu el ĝiaj plej fruaj kaj plej klaraj esprimoj troveblas en la Bagavadgito: „Kvankam estas Mi eterna, sennaskiĝa mond-sinjoro, Mi per Mia fort' mistera kaj per Mia vol' naskiĝas. Ĉiam kiam maljusteco tromultiĝas en la mondo kaj virtoj senfortiĝas, tiam Mi Min mem generas. Por defendi la bonulojn, detruu la malbonulojn kaj firmigi la justecon, diverstempe Mi naskiĝas.“<sup>41</sup> Tiu ĉi daŭranta dramo ankaŭ konsistigas la bazan strukturon de la Biblio, kies vico da libroj rakontas pri la misioj ne nur de Abrahamo kaj de Moseo – „kiun la Eternulo konis, vizaĝon kontraŭ vizaĝo“<sup>42</sup> –, sed ankaŭ de la vico de minoraj profetoj kiuj ellaboris kaj solidigis la verkon kiun tiuj primaraj Aŭtoroj de la procezo lanĉis. Simile la spekulativoj pri la preciza karaktero de Jesuo, kiom ajn disputemaj kaj fantastaj, ne sukcesis Lian mision separi de la transforma influo kiun havis Abrahamo kaj Moseo je la civilizacia procezo. Li mem avertas ke ne estas Li kiu kondamnos tiujn kiuj malakceptas Lian mesaĝon, sed Moseo „... al kiu vi esperas. Ĉar se vi kredus al Moseo, vi ankaŭ kredus al mi, ĉar li skribis pri mi. Sed se vi ne kredas liajn skribojn, kiel vi kredos miajn vortojn?“<sup>43</sup> Kun la revelacio de la Korano la temo de la sinsekvo de la Mesaĝistoj de Dio fariĝis centra: „Diru: Ni kredas je Allah kaj je tio, kion Li sendis al ni, kaj je tio, kion Li sendis al Abraham kaj Iŝmael kaj Isaak kaj Jakob ..., kaj je tio, kio estis donita al Moseo kaj al Jesuo, kaj je tio, kio estis donita al la profetoj de ilia Sinjoro.“<sup>44</sup>

<sup>39</sup> La Nobla Korano 24:36

<sup>40</sup> Genezo 17:7

<sup>41</sup> Bhagavad-Gita (Federacao Espirita Brasileira, dua eldono 1975), ĉapitro IV, 6-8

<sup>42</sup> Readmono 34:10

<sup>43</sup> Sankta Johano 5:45-47

<sup>44</sup> La Nobla Korano 2:137

<sup>43</sup> Por komprenema kaj objektiva leganto de tiaj ekstraktoj elmergiĝas rekono de la esenca unueco de religio. Tiel la termino „Islam“ (laŭlitere „ submetiĝo“ al Dio) signas ne nur la apartan periodon de la Providenco inaŭguritan de Mahometo sed, kiel nemiskompreneble klarigas la vortoj de la Korano, ankaŭ religion mem. Dum prave oni povas paroli pri la unueco de la religioj necesas tamen bone kompreni la kuntekston. Je la plej profunda nivelo, kiel emfazas Bahá'u'lláh, estas nur unu religio. Religio estas religio kiel scienco estas scienco. Unu perceptas kaj esprimas la valorojn progrese efektivigantajn tra Dia revelacio; la alia estas la instrumentaro per kiu la homa menso esploras kaj kapablas ĉiam pli precize influi la senseblan mondon. Unu difinas la celojn de la evolua procezo; la alia asistas je ilia atingo. Kune ili konsistigas la duecan sciosistemon kiu antaŭenpelas la civilizacian progreson. Ilin ambaŭ la Majstro aklamis kiel „brilego de la Suno de l' Vero“.<sup>45</sup>

<sup>44</sup> Estas tial neadekvata rekono de la unika rango de Moseo, Budho, Zoroastro, Jesuo, Mahometo – aŭ de la sinsekvo de avataroj kiuj inspiris la sanktajn skribojn de Hinduismo – vidi ilian verkon kiel fondon de apartaj religioj. Pli ĝuste aprezataj estas ili per la rekono kiel spiritaj edukantoj tra la historio, kiel la animantaj fortoj je la leviĝo de civilizacioj tra kiuj ekfloris la konscio: „Tiu estis en la mondo“, deklaras la Evangelio, „kaj la mondo per li estiĝis ...“<sup>46</sup> Ke iliaj personecoj estas adorataj senfine pli intense ol iuj aliaj historiaj figuroj respegulas la provon esprimi la aliel neesprimeblajn sentojn vekitajn en la koroj de sennombraj milionoj da homoj pro la benoj kiujn ili donis. Per la amo al ili la homaro pli kaj pli lernis kion signifas ami Dion. Ne estas, realisme, alia vojo tion fari. Ilin ne honoras fuŝaj klopodoj kapti la esencan misteron de ilia naturo per dogmoj inventitaj de la homa imago; kio ilin honoras estas ke animo senkondiĉe sian volon submetas al la transforma influo kiun ili peras.

**K**onfuzo same regas la komprenon de la plejmulto pri la kontribuo de religio al la formado de socio kaj pri ĝia rolo je la kulturado de morala konscio. La eble plej evidenta

<sup>45</sup> The Promulgation of Universal Peace: Talks Delivered by 'Abdu'l-Bahá during His Visit to the United States and Canada in 1912, revised edition (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1995), p. 326

<sup>46</sup> Sankta Johano 1:10

ekzemplo estas la malplivalora socia statuso kiun la plej multaj sanktaj tekstoj atribuas al virinoj. Dum la el tio rezultintaj avantaĝoj ĝuataj de viroj sendube signife kontribuis al la solidiĝo de tiu koncepto, ĝi tamen evidente ricevis moralan pravigon el la ĝenerala percepto de la intenco de la skriboj mem. Kun malmultaj esceptoj tiuj tekstoj direktiĝas al viroj kaj atribuas al virinoj servan kaj obean rolon en kaj la socia kaj la religia vivo. Bedaŭrinde tia percepto plorinde simpligis kulpigi ĉefe virinojn por malsukcesoj je grava aspekto de morala progreso, nome la disciplinado de la seksa impulso. El moderna perspektivo facilas rekoni ke tiaj sintenoj estas antaŭjuĝaj kaj maljustaj. Je tiuj stadioj de socia evoluo je kiuj aperis la grandaj Kredoj, iliaj skriboj ĉefe provis kiom eble civilizati tiujn rilatojn, kiuj estis formiĝintaj rezulte de ne plu spureblaj historiaj cirkonstancoj. Facile rekoneblas ke defius la esencan religian celon de la pacienca kulturado de moraleco se oni volus hodiaŭ plu teniĝi je iuj primitivaj normoj.

<sup>46</sup> Kompareblaj konsideradoj fareblas je la rilatoj inter socioj. La longa kaj arda preparado de la hebrea popolo por la misio postulata de ĝi ilustras kiel kompleksa kaj obstina estis la koncernataj moralaj defioj. Por ke povis vekigi kaj flori la spiritaj kapabloj kiujn envokis la profetoj necesis ĉiokoste rezisti la delogojn de la najbaraj idolistaj kulturoj. La en la sanktaj tekstoj priskribataj adekvataj punoj, kiuj trafis kaj la regantojn kaj la regatojn malobservintaj la principojn, ilustras kian gravecon atribuis al ili la Dia intenco. Io komparebla montriĝis en la barakoj de la novnaskita komunumo fondita de Mahometo por transvivi provojn de paganaj arabaj triboj ĝin estingi – kaj en la barbara kruelo kaj la senkompata, vendeta sinteno de la atakantoj. Neniu kiu bone konas la historiajn detalojn havas problemojn kompreni la severecon de la tiurilataj koranaj ordonoj. Dum estis respektataj la monoteismaj kredoj de la judoj kaj kristanoj estis idoladorado nepermesata kaj netolerata. Tiel ene de relative mallonga periodo tiu drakona leĝo sukcesis unuigi la tribojn de la araba duoninsulo kaj starigi la novforĝitan komunumon, kiun dum pli ol kvin jarcentoj karakterizis moralaj, intelektaj, kulturaj kaj ekonomiaj progresoj antaŭe kaj de tiam neatingitaj laŭ kaj rapideco kaj amplekso. Historio emas severe juĝi. Fine el ĝia senindulga perspektivo la konsekvencoj por tiuj kiuj blinde strangolis en iliaj luloj tiajn entreprenojn klare distingeblas disde la profito kiun la mondo kiel tuto gajnis el la triumfo de la biblia vizio por la homaro kaj la progresoj ebligintaj per la genio de la islama civilizacio.

<sup>47</sup> Inter la plej disputataj temoj rilate la konceptojn por la socia evoluo al spirita matureco troviĝas tiu de krimo kaj punado. Ankaŭ se ili malsamis je detaloj kaj gradoj – la punoj preskribitaj de la plej multaj sanktaj tekstoj por lezoj de aŭ la komuna bono aŭ la rajtoj de aliuoj kutime estis rigoraj. Krome ili ofte ankaŭ permesis al la damaĝitoj aŭ membroj de ilia familio venĝi sin kontraŭ la kulpintoj. El historia perspektivo oni tamen sin serioze demandu kiaj praktikeblaj alternativoj ekzistis. Mankis ne nur la hodiaŭaj programoj por psikologie modifi kondutojn, sed eĉ ne ekzistis tiaj sankciaj opcioj kiel prizono kaj polico. La zorgo de la religio estis en la ĝeneralan konscion neforviŝeble enskribi la moralan neakcepteblon – kaj la praktikajn konsekvencojn – de konduto kies efiko demoralizus strebojn al socia progreso. La tuta civilizacio de tiam profitis kaj estus nehoneŝte tiun fakton ne agnoski.

<sup>48</sup> Tiel okazis en ĉiuj religioj kies originoj skribe transvivis. Almozpetado, sklavismo, aŭtokratio, konkerado, etnaj antaŭjuĝoj kaj aliaj nedezirindaĵoj en socia interagado povis okazi sensankcie – aŭ estis eksplicite indulgataj – dum la religio provis efektiviĝi plibonigon de tiaj kondutmanieroj, kiuj estis konsiderataj pli urĝaj kaj esencaj je certaj stadioj de la progreso de la civilizacio. Kondamni religion ĉar iuj el ĝiaj sinsekvaj revelacioj ne sukcesis adresi la tutan gamon da sociaj misoj signifus ignori ĉion lernitan pri la karaktero de homa evoluado. Neeviteble tiaspeca anakronisma pensado ankaŭ kaŭzas severajn psikologiajn malhelpojn je la aprezado kaj alfrontado de la bezonoj de la propra tempo.

<sup>49</sup> La temo tamen ne estas la pasinteco sed la implicoj por la hodiaŭo. Problemoj leviĝas tie kie adeptoj de unu el la mondaj Kredoj ne kapablas distingi inter la eternaj kaj la portempaj aspektoj de ilia religio kaj provas altrudi al la socio kondutregulojn kiuj jam antaŭlonge estis plenumintaj sian devon. Tiu principo estas fundamenta por kompreni la socian rolon de religio: „La rimedo kiun la mondo bezonas dum sia hodiaŭa afliktiĝo neniel povas esti la sama kiel tiu kiun onta epoko eble bezonas“, klarigis Bahá'u'lláh. „Okupiĝu vi zorge pri la bezonoj de la epoko en kiu vivas vi kaj koncentru viajn pripensadojn je ĝiaj urĝoj kaj postuloj.“<sup>47</sup>

La postuloj de la nova epoko de homa evoluo kiujn alfronti Bahá'u'lláh alvokis la politikajn kaj religiajn gvidantojn de la deknaŭa jarcento estas hodiaŭ plejparte rekonitaj, almenaŭ kiel idealoj, de iliaj posteuloj kaj de progresemaj mensoj ĉie ajn. Kiam venis al sia fino la dudeka jarcento centraj temoj de la tutmonda diskurso estis principoj, kiujn oni ankoraŭ nur malmultajn jardekojn pli frue konsideris esti pure viziaj kaj senespere nerealismaj. Apogitaj per la eltrovoj de scienca esplorado kaj la konkludoj de influaj komisionoj – ofte lukse financataj – tiuj principoj nun gvidas la laboron de potencaj institucioj je la internacia, nacia kaj loka nivelo. Vasta scienca literaturo en multaj lingvoj sin dediĉas al la esplorado de praktikaj rimedoj por ilin efektiviĝi kaj tiaj programoj povas kalkuli je la atento de la amaskomunikiloj sur kvin kontinentoj.

<sup>51</sup> La plej multajn el tiuj principoj oni tamen ankaŭ vaste ridindigas, ne nur inter evidentaj malamikoj de socia paco sed ankaŭ en cirkloj kiuj sin profesie al ili devontigas. Kio mankas estas ne kredeblaj pruvoj pri ilia bezonateco sed la potenco de morala konvinkiteco kiu povas ilin efektiviĝi, potenco kies sola evidente fidinda fonto tra la historio estis religia kredo. Ĝis la komenco de la misio de Bahá'u'lláh religia aŭtoritato ankoraŭ havis signifan socian influon. Kiam la kristana mondo estis instigita rompi kun miljara senduba tradicio kaj finfine ĉesigi sklavismon, estis bibliaj idealoj al kiuj la fruaj britaj reformantoj provis apelacii. Sekve en sia decida parolado pri la centra rolo, kiun ĉi tiu temo okupis en la granda amerika konflikto, la usona prezidento avertis ke se „ĉiu sangoguto kaŭzita de la vipo estu pagata per alia per la glavo, kiel estis dirita antaŭ tri mil jaroj, necesas tamen diri: „La juĝoj de la Sinjoro estas pravaj kaj justaj.“<sup>48</sup> Tiu epoko tamen rapide finiĝis. Dum la renversiĝoj kiuj sekvis la Duan Mondmiliton eĉ tiel influhava personeco kiel Mohandas Gandhi montriĝis nekapabla mobilizi la spiritan forton de Hinduismo por apogi siajn klopodojn estingi sektan violenton sur la hinda subkontinento. Nek estis iel pli efikaj tiurilate la gvidantoj de la islama komunumo. Kiel aŭguris la metafora vizio de la Korano pri „la tago, en kiu Ni kunrulos la ĉielon kiel kunruliĝas la skribvolvaĵoj“,<sup>49</sup> la iam nedefiebla aŭtoritato de la tradiciaj religioj ĉesis determini la sociajn rilatojn de la homaro.

<sup>48</sup> Abraham Lincoln, citita en *Inaugural Addresses of the Presidents of the United States* (Washington, D.C.: U.S. Government Printing Office, 1989)

<sup>49</sup> La Nobla Korano 21:104

<sup>52</sup> En tiu ĉi kunteksto oni povas aprezi la metaforon elektitan de Bahá'u'lláh pri la volo de Dio por la nova epoko: „Ne pensu vi ke Ni revelacias al vi nuran kodon da leĝoj. Ne, pli ĝuste malsigelis Ni la vinon elektindan per la fingroj de l' povo kaj potenco.“<sup>50</sup> Per Lia revelacio la principoj bezonataj por la kolektiva maturiĝo de la homaro ricevis tiun povon kiu kapablas penetri ĝis al la radikoj de homaj motivoj kaj kondutoŝanĝo. Por tiuj kiuj Lin renkonas la egalrajteco de viroj kaj virinoj estas ne sociologia aksiomo sed revelaciita vero pri la homa naturo kun implico por ĉiu aspekto de interhomaj rilatoj. La samo validas por Lia instruo de la principo de homara unueco. Ĝenerala edukado, libereco de pensado, la protektado de homaj rajtoj, rekono ke la vastaj resursoj de la tero estas donajo por la tuta homaro, la responso de la socio por la bonfarto de ĝiaj civitanoj, la akcelado de scienca esplorado, eĉ tia praktika principo kiel internacia helpa lingvo antaŭeniganta la integriĝon de la popoloj de la mondo – por ĉiuj kiuj akceptas la revelacion de Bahá'u'lláh tiuj ĉi kaj similaj preceptoj havas la saman devontigan aŭtoritaton kiel la ordonoj en Liaj skriboj malpermesantaj idolkulton, ŝteladon kaj falsan atestadon. Dum aludoj pri kelkaj percepteblas en pli fruaj sanktaj skriboj, devis ilia difinado kaj preskribo atendi ĝis kiam la heterogenaj populacioj de la planedo ekkapablis komune malkovri sian naturon de unusola homaro. Tra la spirita rajtigo generita de la revelacio de Bahá'u'lláh aprezeblas la Diaj normoj ne kiel izolaj principoj kaj leĝoj sed kiel facetoj de unusola, ĉionampleksanta vizio por la estonteco de la homaro – kun revolucia intenco kaj ravantaj eblecoj prezentiĝantaj.

<sup>53</sup> Integra ero de tiuj instruoj estas principoj por la administrado de la kolektivaj aferoj de la homaro. Vaste citata ekstrakto el la epistolo de Bahá'u'lláh al reĝino Viktorino emfaze laŭdas la principon de demokratia kaj konstitucia regado, sed ankaŭ admonas pri la kunteksto de tutmonda responso en kiu devas funkcii tiu principo se ĝi realigu sian celon en la nuna epoko: „Ho vi, la elektitaj reprezentantoj de la popoloj en ĉiuj landoj! Interkonsiliĝu vi kaj koncentriĝu vi nur je tio el kio profitos la homaro kaj kio bonigos ĝiajn kondiĉojn – se do vi apartenas al tiuj kiuj zorge ekzamenas. Konsideru la mondon kiel la homan korpon, kiun, kvankam kompleta kaj perfekta je ĝia kreo, diverskiale afliktas seriozaj perturboj kaj malsanoj. Eĉ ne unu tagon pasigis ĝi en trankvilo, ne, ĝia malsaneco serioze kreskis, ĉar ĝi falis en la manojn

<sup>50</sup> The Kitáb-i-Aqdas 5

de ignorantaj kuracistoj, kiuj senbride lasis regisajn proprajn dezirojn kaj kiuj ĉagrene eraris. Kaj se, iam, pro la prizorgo de kompetenta kuracisto iu membro de la korpo estis sanigita, la cetero kiel antaŭe restis malsana.”<sup>51</sup> En aliaj ekstraktoj Bahá'u'lláh nomas iujn el la praktikaj implicoj. La registaroj de la mondo estas alvokataj kunvenigi internacian konsultan korporacion kiel fundamenton, en la vortoj de la Gardanto, de „monda federacia sistemo”<sup>52</sup> rajtigita gardi la aŭtonomion kaj teritorion de siaj membroŝtatoj, solvi naciajn kaj regionajn disputojn kaj kunordigi programojn de tutmonda evoluado por la bono de la tuta homaro. Signifoplene Bahá'u'lláh atribuas al tiu ĉi sistemo, kiam estos ĝi efektivigita, la rajton perforte subpremi agresojn de unu ŝtato kontraŭ alia. Alparolante la siatempajn regantojn Li asertis la klaran moralan aŭtoritaton de tia agmaniero: „Se iu el vi levos armilojn kontraŭ alia leviĝu vi ĉiuj kontraŭ li ĉar tio evidente estas nura justeco.”<sup>53</sup>

**U**neco estas la forto per kiu tiuj celoj iom post iom realiĝos. Kvankam por bahaanoj ĝiaj implicoj por la nuntempa civilizacia krizo estas la plej evidenta vero, ili tamen ŝajnas plejparte eskapi la aktualajn diskursojn. Ke estas malunueco la ĝenerala malsano sapeanta la bonfarton de la homaro, tion nur malmultaj kontestas. Ĝiaj manifestiĝoj ĉie kripligas politikan volon, senfortigas kolektivajn urĝojn al ŝanĝado kaj venenas naciajn kaj religiajn rilatojn. Kiel strange do ke unueco estas konsiderata kiel celo atingebla, se iam, nur en dista futuro post kiam tuta aro da malordoj en la socia, politika, ekonomia kaj morala vivo estos traktataj kaj iel aŭ tiel eliminataj. Sed tiuj malordoj ja esence estas simptomoj kaj flankefikoj de la problemoj kaj ne ĝia funda kaŭzo. Kiel povis vaste akceptiĝi tiel fundamenta inversiĝo de la realo? La respondo supozeble estas: ĉar oni pensas ke estas tute ekster la kapablo de la ekzistantaj sociaj institucioj atingi veran unuecon mensan kaj koran inter homoj kies vivmaniero kaj vivperceptoj tiel profunde malsamas. Dum tiu ĉi silenta konfeso estas bonvena progreso rilate la komprenon de socievoluaj procezoj – kompare kun tia reginta ankoraŭ antaŭ kelkaj jardekoj – ĝi tamen praktike helpas malmulte je la solvado de la defio.

<sup>55</sup> Unueco estas kondiĉo de la homa spirito. Edukado povas ĝin subteni kaj antaŭenigi same kiel leĝfarado. Sed ili povas tion nur se ĝi mem elmergiĝis kaj establiĝis kiel deviga forto en la socia vivo. La tutmonda intelektularo, kies receptojn larĝe determinas materiismaj miskonceptoj de la realo, tamen firme sin kroĉas al la espero ke inventemaj sociaj reformadoj subtenataj de politikaj kompromisoj senfine prokrastos la latentajn katastrofojn, kiuj minacas – kiel nur malmultaj neas – la estontecon de la homaro. „Ni povas tre bone rimarki kiel la tuta homaro estas ĉirkaŭata de grandaj, nekalkuleblaj afliktoj”, konstatas Bahá'u'lláh. „Tiuj, kiuj sin venenis per aroganteco, trudis sin inter la homojn kaj la Dian, neerareman Kuraciston. Vidu, kiel ili implikis ĉiujn homojn inkluzive de si mem en la maŝojn de siaj intrigoj. Ili povas nek malkovri la kaŭzon de la malsano nek havas ili ian ideon pri kuracilo.”<sup>54</sup> Unueco estas la kuracilo por la malsanoj de la mondo kaj ĝia sola certa fonto estas renovigi la influon de la religio sur la homaj aferoj. La leĝoj kaj principoj revelaciitaj de Dio estas hodiaŭ, kiel deklaras Bahá'u'lláh, „la plej potencaj instrumentoj kaj la plej certaj el ĉiuj rimedoj por ke povos aŭrori la lumo de unueco inter la homoj.”<sup>55</sup> „Kio ajn estas konstruita sur ĝia fundamento – nek la ŝanĝoj kaj hazardoj de la mondo povos iam difekti ĝian forton nek la sinsekvo de sennombraj jarcentoj degenerigi ĝian strukturon.”<sup>56</sup>

<sup>56</sup> Centra por la misio de Bahá'u'lláh tial estis la starigo de tutmonda komunumo respegulanta la unuecon de la homaro. La fina atesto, kiun la bahaa komunumo povas prezenti por pravigi Lian mision, estas la ekzemplo de unueco kiun Liaj instruoj produktis. Enirante la dudek unuan jarcenton la bahaa afero estas fenomeno kian la mondo ankoraŭ ne vidis. Post jardekoj da klopodoj, dum kiuj ondoj da kreskado alternis kun longaj periodoj da konsolidiĝo, kiujn ofte ombris malprogresoj, la bahaa komunumo hodiaŭ ampleksas kelkajn milionojn da homoj reprezentantaj efektive ĉiun etnan, kulturan, socian kaj religian fonon surtere kaj administrantaj siajn kolektivajn aferojn sen klerikaro tra demokrate elektitaj institucioj. La multaj miloj da lokoj kie ĝi enradikiĝis troviĝas en ĉiu lando, teritorio kaj signifa insularo, de la arkto ĝis Fuego, de Afriko ĝis la Pacifiko. Apenaŭ iu konanta la faktojn pridubos la aserton ke tiu ĉi komunumo jam nun konsistigas eble la plej diversecan kaj geografie

<sup>51</sup> The Summons of the Lord of Hosts 174

<sup>52</sup> Shoghi Effendi, *The World Order of Bahá'u'lláh*, p. 204

<sup>53</sup> Bahá'u'lláh, citita en Shoghi Effendi, *The World Order of Bahá'u'lláh*, p. 192

<sup>54</sup> Gleanings 106:2

<sup>55</sup> Tablets of Bahá'u'lláh 8:63

<sup>56</sup> Samloke 11:15

plej disvastiĝintan el ĉiuj similaj homaj organizaĵoj sur la planedo.

<sup>57</sup> Tiujn atingojn necesas kompreni. Kutimaj klarigoj – dispono de grandaj financaj rimedoj, la patronado de potencaj politikaj interesoj, la uzado de kaŝitaj aŭ agresaj prozelitigaj programoj semantaj timon pri Dia kolero – neniel rolis en tiuj disvolviĝoj. La adeptoj de la Kredo akiris identecon kiel membroj de unusola homaro, identecon kiu formas la celon de ilia vivo kaj kiu neniel pretendas ian immanentan moralan superecon: „Ho popolo de Bahá! Ke estas neniu kiu povus kun vi rivali estas signo de korfavoro.“<sup>57</sup> Justa observanto estas devigata agnoski almenaŭ la eblecon ke tiu fenomeno montras la efikon de influoj – kiujn eblas nur priskribi kiel spiritaj kaj laŭ sia naturo komplete malsamaj ol konataj – kapablaj generi je ordinaraĵoj homoj de ĉia fono eksterordinarajn bravajojn de sinoferado kaj komprenado.

<sup>58</sup> Aparte frapa estas la fakto ke Bahaismo kapablis vivteni la tiel atingitan unuecon, nerompita kaj sendifekta, tra la plej vundeblaj fruaj stadioj de sia ekzistado. Oni vane serĉos alian homan asocion tra la historio – politikan, religian aŭ socian – kiu sukcese transvivis la daŭran stigmaton de skismo kaj splitiĝo. La baha komunumo estas, je ĉia ĝia diverseco, unusola ligo de homoj, unueca en sia kompreno pri la intenco de la revelacio de Dio kiu ĝin naskis, unueca en sia sindediĉo al la administra ordo kiun ĝia Aŭtoro kreis por gvidi ĝiajn kolektivajn aferojn, unueca en sia sindono al la tasko dissemadi Lian mesaĝon tra la tuta planedo. Tra la jardekoj de sia leviĝo kelkaj individuoj, iuj el ili altrangaj kaj ĉiuj motivitaj de personaj ambicioj, pleje klopodis akiri propran sekvantanaron lojala al ili mem aŭ al la personaj interpretoj kiujn ili trudis al la skriboj de Bahá'u'lláh. Je pli fruaj stadioj en la evoluado de religio similaj provoj sukcesis spliti la novnaskitajn kredojn en rivalantajn sektojn. En la kazo de Bahaismo tamen tiaj intrigoj senescepte malsukcesis produkti pli ol efemerajn salvojn da polemikoj kies neta efiko estis plifundigi la komprenon de la komunumo pri la celo de ĝia Fondinto kaj sian sindonon al ĝi. „Tiel potenco estas la lumo de unueco“, certigas Bahá'u'lláh tiujn kiuj rekonas Lin, „ke ĝi kapablas ilumini la tutan mondon.“<sup>58</sup> Konsciigante al si kia estas la homa naturo oni povas facile aprezi ke laŭ anticipo de la Gardanto tiu puriga procezo longe daŭros esti –

paradokse kaj necese – integra trajto de la maturiĝo de la baha komunumo.

**E**l la forlaso de la kredo je Dio logike rezultis paralizo de la kapablo efike fronti la problemon de la malbono aŭ, en multaj kazoj, eĉ nur agnoski ĝin. Dum bahaanoj ne atribuas al tiu ĉi fenomeno objektivan ekziston, kiel okazis dum pli fruaj stadioj de la religia historio, severe kripligan efikon havas la neado de la bono – kiel ĉe malhelo, malscio aŭ malsano. Pasas nur malmultaj eldonsezonoj dum kiuj al la klera leganto ne estas ofertata tuta aro da novaj kaj inventemaj analizoj de la karaktero de iuj el la monstraj figuroj kiuj dum la dudeka jarcento sisteme torturis, malnobligis kaj ekstermis milionojn da iliaj kunhomoj. Por provi kompreni la obsedojn nutrintajn ilian evidente senfundan homarhaton oni estas invitata de scienca aŭtoritato konsideri la gravecon havintan jen patra mistraktado, jen socia malakceptado, profesia seniluziĝo, povreco, maljusteco, travivo de milito, ebla gentika difekto, nihilisma literaturo – aŭ variaj kombinoj de tiuj. Okulfrape mankanta inter tiaj nuntempaj spekulativoj estas kion kleraj komentistoj antaŭ nur unu jarcento ankoraŭ estus rekonintaj kiel spirita malsano – kio ajn ĝiaj akompanaj trajtoj.

<sup>60</sup> Se unueco fakte estas la lakmusa testo de homa progreso, nek la historio nek la Ĉielo pretos pardoni tiujn kiuj intence levas sian manon kontraŭ ĝi. Homoj fidantaj reduktas siajn defendojn kaj sin malfermas al aliaj. Sen fari tion ili povas neniel sin tutkore devontigi al komunaj celoj. Nenio tiel ruinigas kiel subita malkovro ke la propraj devontigoj bonfide faritaj por aliulo estis por tiu nenio ol gajnita avantaĝo, rimedo por akiri kaŝitan celon malsaman ol aŭ eĉ malamikan al tio kion oni pretendis fari kune. Tia trompado persiste fadenas tra la homa historio kaj la pratempa rakonto pri la ĵaluzo de Kaino kontraŭ sia frato, kies kredon Dio konfirmis, estas unu el ĝiaj plej fruaj registritaj esprimiĝoj. Se la konsterniga suferado eltenata de la popoloj de la mondo dum la dudeka jarcento postlasis lecionon, estas la fakto ke la sistema malunueco, heredita el malhela pasinteco kaj veneninta rilatojn en ĉiuj vivsferoj, povis en nia epoko malfermi la pordon al demona konduto pli besta ol io ajn kion la menso konsideris ebla.

<sup>61</sup> La malbono havas nomon. Ĝi certe estas la intenca atenco kontraŭ la pene starigitaj pacemaj kaj akordiĝemaj interligoj per kiuj homoj bonvolaj

<sup>57</sup> Bahá'u'lláh, citita en Shoghi Effendi, *The Advent of Divine Justice*, paĝo 84

<sup>58</sup> *Gleanings* 132:3



provis eskapi el la pasinteco kaj konstrui kune novan estontecon. Laŭ sia naturo unueco postulas sinoferadon. „Mem-amo“, konstatas la Majstro, „estas knedita en la argilon de la homo mem.“<sup>59</sup> La egoo, por kiu Li uzis la terminon „insista memo“<sup>60</sup>, instinkte rezistas kontraŭ limigoj truditaj al kion ĝi konsideras esti sia libereco. La individuo, por vole rezigni pri la kontentigoj kiujn donas la ebleco senlime povi fari kion oni volas, devas konvinkigi ke vera kontento atingeblas aliel. Lastinstance atingeblas ĝi, kiel ĉiam estis, per tio ke la animo submetiĝas al Dio.

<sup>62</sup> Tia submetiĝo estas defio, sed el la malsukceso fronti ĝin tra la jarcentoj sekvis aparte detruaj konsekvencoj perfidantaj la Mesaĝistojn de Dio kaj la de ili instruitajn idealojn. Ĉi tie ne estas la loko por prezenti la karakteron kaj la provizojn de tiu specifa Interligo per kiu Bahá'u'lláh sukcese konservas la unuecon de tiuj kiuj Lin rekonas kaj sin al Lia intenco dediĉas. Sufiĉas noti la severecon de la lingvaĵo kiun Li rezervas por tiuj kiuj ĝin intence malobservas dum samtempe ili pretendas lojali al ĝi: „Tiuj turniĝintaj for de ĝi estas kalkulataj de la Sinjoro, la Ĉiopova, la Nedevigata inter tiuj troviĝantaj en la fajro plej profunda.“<sup>61</sup> La kialo por la severeco de tiu ĉi kondamno estas evidenta. Nur por malmultaj homoj ne facilas vidi la danĝeron kiun kaŭzas por la socia bonfarto tiaj konataj krimoj kiel murdo, rabo aŭ fraŭdo, aŭ la neceson ke la socio aplikas efikajn memprotektajn rimedojn. Sed kion pensu bahaanoj pri perverseco kiu, se ne malhelpata, detruus la rimedon mem per kiu esence estas generata unueco kaj kiu fariĝus, en la senkompromisaj vortoj de la Majstro, „toporo dishakanta la radikon mem de la Benita Arbo.“<sup>62</sup> Tie ĉi ne temas pri intelekta malkonsento aŭ eĉ pri morala malforteco. Multaj homoj hezitas akcepti aŭtoritaton ian aŭ tian kaj fine fortiriĝas el cirkonstancoj kiuj ĝin postulas. Personoj kiujn iam altiris la Bahaa Kredo sed kiuj decidis ĝin forlasi – pro kiu ajn kialo – estas tute liberaj tion fari.

<sup>63</sup> Rompi la Interligon estas fenomeno laŭ sia naturo funde malsama. La impulso kiun ĝi incitas en tiuj troviĝantaj sub ĝia influo ne estas simple la emo libere sekvi ian ajn padon pri kiu ili kredas ke ĝi kondukas ilin al persona kontento aŭ ebligas al ili

kontribui al la socio. Pli ĝuste tiajn personojn pelas evidente neregebla persista emo trudi al la komunumo sian personan volon per ajna rimedo al ili havebla – ne konsiderante la damaĝon kaŭzatan kaj sen respekto por la solene gravaj taskoj, kiujn ili kuntransprenis per sia akceptiĝo kiel membro de tiu komunumo. Finfine la memo fariĝas la superreganta aŭtoritato ne nur en la propra vivo de la individuo sed ankaŭ en ĉiu ajn alia vivo kiu estas sukcese influata. Kiel longa kaj tragika sperto demonstris pli ol klare, eblas jungi tiajn dotojn kiel distinga deveno, intelekta kapablo, klero, pieco aŭ gvida socia pozicio egale bone al la servado de la homaro aŭ al tiu de la persona ambicio. En pasintaj tempoj, kiam la Dia intenco fokusiĝis je alikarakteraj spiritaj prioritatoj, la konsekvencoj de tia ribelado ne kapablis difekti la centran mesaĝon de iuj el la sinsekvaj revelacioj de Dio. Hodiaŭ tamen, kiam la fizika unuiĝo de la planedo alportis tiel grandegajn eblecojn kaj terurigajn danĝerojn, fariĝis la devontigo al la postuloj de unueco la kriterio por ĉiuj pretendoj sindoni al la volo de Dio aŭ, samĝuste, al la bonfarto de la homaro.

**Ĉ**io en ĝia historio ekpilis Bahaismon por fronti la nunan defion. Eĉ je tiu ĉi relative frua stadio de sia disvolviĝo – kaj kun siaj ankoraŭ relative limigitaj resursoj – la bahaa entrepreno plene meritas la respekton akiritan. Observanto ne devas akcepti ĝiajn pretendojn je Dia origino por aprezi kion ĝi atingas. Ankaŭ konsiderataj kiel pure imanenta fenomeno estas mem la karaktero kaj la atingoj de la bahaa komunumo sufiĉa ĝustigo por la atento, kiun iu ajn serioze koncernata kun la civilizacia krizo donas al ili pro tio ke ili evidentigas ke povas lerni la popoloj de la mondo kun ĉia sia diverseco vivi kaj labori kune kaj trovi kontenton kiel unusola homaro en unusola tutmonda hejmlando.

<sup>65</sup> Tiu ĉi fakto substrekas – se bezonatas ia plia emfazo – la urĝon de la sinsekvaj planoj ellaboritaj de la Universala Domo de Justeco por la ekspansio kaj fortikiĝo de la Kredo. La cetera homaro havas ĉian rajton esperi ke grupo da homoj, kiu vere kaj sincere sin devontigas al la vizio de unueco kiel ĝi estas enkorpigita en la skriboj de Bahá'u'lláh, fariĝos pli kaj pli vigla kontribuanto al programoj de socia plibonigado, kiuj por esti sukcesaj dependas ĝuste de la forta efiko de unueco. Por plenumi tiun esperon la bahaa komunumo devos kreski ĉiam pli rapide, devos vaste multigi la

<sup>59</sup> 'Abdu'l-Bahá, *The Secret of Divine Civilization* (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1990), p. 96

<sup>60</sup> *Selections from the Writings of 'Abdu'l-Bahá* (Haifa: Bahá'í World Centre, 1997), p. 256

<sup>61</sup> Bahá'u'lláh, el ankoraŭ ne tradukita epistolo

<sup>62</sup> *Will and Testament of 'Abdu'l-Bahá* (Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1944) 3:9

homajn kaj materiajn resursojn investatajn en ĝian laboron, kaj devos ankoraŭ pli diversigi la gamon da talentoj kiuj ĝin ekipas por esti utila partnero de similcelaj organizaĵoj. Krom la sociajn celojn de la klopodoj necesas vidi ankaŭ la milionojn da same sinceraj homoj, kiuj ankoraŭ ne konscias pri la misio de Bahá'u'lláh, sed kiujn inspiras multaj ĝiaj idealoj kaj kiuj sopiras trovi eblecon je vivo de servado havanta daŭran sencon.

<sup>66</sup> La kulturo de sistema kreskado enradikiĝanta en la bahaa komunumo ŝajnas tial esti la vere plej efika respondo, kiun la amikoj povas doni al la defio diskutata sur tiu ĉi paĝoj. La intensa kaj daŭra mergiĝo en la Krea Vorto pli kaj pli liberigas onin el la stringo de la materiismaj premisoj – kiujn Bahá'u'lláh nomas „la aludoj de la enkorpiĝoj de satana kaprico“<sup>63</sup> – traperantaj la socion kaj paralizantaj impulsojn al ŝanĝo. Ĝi generas en oni la kapablon asisti siajn amikojn kaj konatulojn je tio ke ilia strebado al unueco trovas maturan kaj inteligentan esprimiĝon. La karaktero de la kernaktivecoj de la nuntempa plano – klasoj por infanoj, preĝkunvenoj kaj studcirkloj – permesas al plimultiĝanta nombro da personoj ankoraŭ ne konsiderantaj sin kiel bahaanoj senti sin libera partopreni en la procezo. La rezulto estas la stariĝo de tio kio estas taŭge nomata „komunumo de interesiĝo“. Kiam aliaj profitas el la partopreno kaj sin identigas kun la celoj de Bahaismo ili, kiel montras la spertoj, ankaŭ emas sin plene devontigi al Bahá'u'lláh kiel aktivaj agantoj por Liaj intencoj. Tial povas tutkora efektivigado de la plano – krom realigi ĝiajn konkretajn celojn – enorme plivastigi la kontribuon de la bahaa komunumo al la publika diskurso pri tio kio fariĝis la plej urĝa problemo frontata de la homaro.

<sup>67</sup> Tamen, se la bahaanoj volas plenumi la mandaton de Bahá'u'lláh evidente esencas ke ili ekkomprenas, ke ne estas konkurencaj aktivecoj la paralelaj klopodoj antaŭenigi socian plibonigon kaj konvinki pri la Bahaa Kredo. Pli ĝuste estas ili reciprokaj eroj de unu kohera tutmonda programo. Malsamajn alirojn ĉefe kaŭzas la malsamaj bezonoj kaj malsamaj gradoj da interesiĝo kiujn la amikoj renkontas. Ĉar la libera volo estas imanenta donitaĵo de la animo, devos ĉiu persono, kiu estas altirata esplori la instruojn de Bahá'u'lláh, trovi sian propran lokon en la neniam finiĝanta kontinuo de spirita serĉado. Ĉiu devos mem, en la privateco de sia propra konscio kaj sen premo, decidi kiuj spiritaj responsoj sekvas el tiu malkovro. Por povi tiun aŭtonomion inteligente apliki necesas tamen ke

homo akiras kaj perspektivon pri la ŝanĝoprocezo en kiu ĝi, kiel la cetera homaro, estas implikita kaj klaran komprenon pri la sekvoj por la propra vivo. La devo de la bahaa komunumo estas fari ĉion kion ĝi kapablas por asisti la homaron je ĉiuj stadioj de sia universala moviĝo voje al reunuiĝo kun Dio. La Dia Plano kiun la Majstro testamentis estas la instrumento per kiu tiu ĉi laboro plenumatas.

<sup>68</sup> Tial – kiel ajn centra la idealo de la unueco de religio sendube estas – la tasko dividi la mesaĝon de Bahá'u'lláh evidente ne estas interreligia projekto. Dum la menso serĉas intelektan klarecon la animo sopiras akiri certecon. Tia interna konvinkiteco estas la finfina celo de ĉia spirita serĉado, sendepende de kiom rapida aŭ iompost-ioma la procezo eble estas. Konvertiĝo estas por la animo ne okaza aŭ incidenta aspekto de la esplorado de religia vero, sed la ŝlosila demando kiun iam necesas respondi. La tiurilataj vortoj de Bahá'u'lláh estas senambiguaj kaj ne estu ambigua pri tio la menso de tiuj kiuj klopodas servi al Li: „Vere diras Mi, tiu ĉi estas la Tago, kiam la homaro povas vidi la Vizaĝon de la Promesito kaj aŭdi Lia Voĉon. La Voko de Dio eksonis kaj la lumo de Lia vizaĝo ekleviĝis super la homoj. Decas al ĉiu forviŝi la spuron de ĉiu vanta parolo el sia koro kaj per aperta kaj senantaŭjuĝa menso observi la signojn de Lia Revelacio, la pruvojn de Lia Misio kaj la signojn de Lia gloro.“<sup>64</sup>

**U**nu el la distingaj trajtoj de la moderno estas la universala vekigo de historia konscio. Rezulto de tiu revolucia perspektivoŝanĝo multe faciliganta la diskonigon de la mesaĝo de Bahá'u'lláh estas la kapablo de homoj havantaj la ŝancon rekoni ke la tuta korpuso de la sanktaj tekstoj de la homaro metas la dramon de saviĝo mem rekte en la kuntekston de la historio. Sub la surfaco de lingvaĵo simbola kaj metafora, religio – kiel la skriboj ĝin rivelas – funkcias ne tra arbitraj diktoj de magio sed kiel procezo de plenumiĝado disvolviĝanta en fizika mondo tiucele kreita de Dio.

<sup>70</sup> Tiurilate la tekstoj parolas per unu voĉo: La celo de la religio estas ke la homaro atingas la epokon de „rikolto“<sup>65</sup>, de „unu grego, unu paŝtisto“<sup>66</sup>; la grandan ontan epokon kiam „brilegos

<sup>64</sup> Gleanings 1:1

<sup>65</sup> The Summons of the Lord of Hosts, 126

<sup>66</sup> Sankta Johano 10:16

<sup>63</sup> The Kitáb-i-Íqán 213

la tero en la lumego de sia Sinjoro“<sup>67</sup> kaj la volo de Dio plenumatos „kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero“<sup>68</sup>; „la tago[n] promesita[n]“<sup>69</sup> kiam la „sankta urbo“<sup>70</sup> venos „malsupren de .. Dio el la ĉielo“<sup>71</sup>, kiam „la monto de la domo de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj, kaj ĝi estos pli alta ol ĉiuj altajoj; kaj fluos al ĝi ĉiuj nacioj“<sup>72</sup>, kiam Dio demandos por scii „kial vi premas mian popolon kaj ofendas la malriĉulojn?“<sup>73</sup>; la Tagon kiam skribaĵo „sigelita ĝis la fina tempo“<sup>74</sup> estos sensigelata kaj unuiĝo kun Dio esprimiĝos „per nomo nova, kiun eldiros la buŝo de la Eternulo“<sup>75</sup>; epokon komplete alian ol io ajn kion la homaro estos spertinta, la menso konceptinta aŭ la lingvo vortiginta: „Kiel Ni komencis la unuan kreon, Ni renovigos ĝin. Deviga estas por Ni la promeso: vere Ni plenumos ĝin.“<sup>76</sup>

<sup>71</sup> La deklarita celo de la historia sinsekvo de profetaj revelacioj tial estas ne nur gvidi la individuan serĉanton sur la padon de persona saviĝo sed ankaŭ prepari la tutan homaran familion por la granda eskatologia Evento antaŭ kiu nune ĝi staras kaj per kiu la vivo de la mondo mem estos komplete transformata. La revelacio de Bahá'u'lláh estas nek prepara nek profeta. Ĝi estas tiu Evento. Tra ĝia influo la kolosa entrepeno meti la fundamenton de la Regno de Dio estas survojigita kaj la homaro estas dotita per la fortoj kaj kapabloj kiujn postulas tiu tasko. La Regno estas universala civilizacio formita per principoj de socia justeco kaj riĉigita per atingoj de la homa menso kaj spirito trans ĉio ajn kion la nuna epoko kapablas imagi. „Ĉi tio estas la Tago“, deklaras Bahá'u'lláh, „en kiu la plej grandiozaj favoroj elverŝiĝas super la homoj, la Tago, en kiu Lia potencega graco enfluas en ĉion kreitan. ... La hodiaŭa ordo baldaŭ estos envolvita kaj nova ordo disvolvita anstataŭe.“<sup>77</sup>

<sup>72</sup> Servado al la celo necesigas kompreni la fundamentan diferencon distingantan la mision de Bahá'u'lláh disde politikaj kaj ideologiaj projektoj homfaritaj. La morala vakuo kiu kaŭzis la hororojn de la dudeka jarcento videbligis la finajn limojn de

la kapabloj de la nehelpata menso percepti kaj konstrui idealan socion – kiel ajn granda la materialaj resursoj utiligataj por la efektivigo. La rezultinta suferado neforviŝeble gravuris tiun lecionon en la konscion de la homaro. Pro tio la perspektivo de la religio por la estonteco de la homaro havas nenion komunan kun la sistemoj de la pasinteco – kaj relative malmulte rilatas al tiuj de la hodiaŭo. Ĝi envokas, se eblas tiel diri, realon en la genetika kodo de la racia animo. La Regno Ĉiela, kiel instruis Jesuo antaŭ du mil jaroj, troviĝas „inter vi“<sup>78</sup>. Liaj vivaj analogioj pri „vinberĝardeno“<sup>79</sup>, pri ricevi „semon sur la bona tero“<sup>80</sup>, pri la „bona arbo [kiu] donas bonajn fruktojn“<sup>81</sup> parolas pri latentaj kapabloj de la homa specio kiujn Dio nutris kaj trejnigis ekde la komenco de la tempo. Ilia efektiviĝado estas la celo kaj gvida principo de la krea procezo. La daŭra laboro de pacienca kultivado estas la tasko kiun Bahá'u'lláh konfidis al la kunularo de tiuj kiuj rekonas Lin kaj eniras Lian Aferon. Ne povas tial mirigi la ekzalta lingvaĵo per kiu Li parolas pri privilegio tiel granda: „Estas vi la steloj sur la ĉielo de komprenado, la zefiro vigliganta je tagekiĝo, la milde fluantaj akvoj de kiuj devas dependi la vivo mem de ĉiuj homoj ...“<sup>82</sup>

<sup>73</sup> La procezo tenas en si mem la konfirmon de sia plenumiĝo. Por tiuj dotitaj per okuloj vidantaj la nova kreaĵo hodiaŭ ĉie elmergiĝas same kiel ĝermanta planto kun la paso de tempo fariĝas fruktodona arbo aŭ infano atingas adoltecon. Sinsekvaj revelacioj de amanta kaj klarintenca Kreanto portis la enloĝantaron de la Tero al la sojlo de sia kolektiva plenaĝiĝo kiel unusola popolo. Bahá'u'lláh nun alvokas la homaron akcepti sian heredaĵon: „Kion la Eternulo ordonis kiel suverenon kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon, estas la unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala Religio, unu komuna Kredo.“<sup>83</sup>

<sup>67</sup> La Nobla Korano 39:70

<sup>68</sup> Sankta Mateo 6:10

<sup>69</sup> La Nobla Korano 85:3

<sup>70</sup> Apokalipso 21:2

<sup>71</sup> Samloke 3:12

<sup>72</sup> Jesaja 2:2

<sup>73</sup> Samloke 3:15

<sup>74</sup> Daniel 12:9

<sup>75</sup> Jesaja 62:2

<sup>76</sup> La Nobla Korano 21:104

<sup>77</sup> Gleanings 4:1-2

<sup>78</sup> Sankta Luko 17:21

<sup>79</sup> Sankta Mateo 21:33

<sup>80</sup> Samloke 13:23

<sup>81</sup> Samloke 7:17

<sup>82</sup> Gleanings 96:3

<sup>83</sup> Samloke 120:3